


# IL POPOLO CINQUE

中國報通

4

1985





*Printempa kamparo*

Foto de GAŬ MINGJI

## Enhavo

### Urbeta industrio:

Esploro pri la ĉinaj urbetoj kaj ilia industrio . . . . .	2
En kamparaj urbetoj . . . . .	6
Industrioj de Uŝji . . . . .	9

### Esperanto:

20-jara jubileo de la ĉina esperanta disaŭdigo . . . . .	21
Solidaj paŝoj de Esperanto-movado en Ŝandong-provinco. . . . .	24
La motoro de la evoluo estas la uzado de la plej granda nombro . . . . .	27
“Montara Vilaĝo” de Chun-chan Yeh eldonita . . . . .	26
Esp-Novajoj . . . . .	29

<b>Tibeto hieraŭ kaj hodiaŭ (4):</b> Tibeta popolo, la mastro de sia hejmloko . . . . .	53
---	----

<b>Malfermitaj urboj:</b> Ĉinhŭangdaŭ, la plej granda karbohaveno de Ĉinio . . . . .	12
--	----

<b>Trafiko:</b> Sekura kaj rapida servo de la ĉina civila aviado . . . . .	18
--	----

<b>Eduko:</b> Lulilo de ĉinaj marnavigistoj . . . . .	39
---	----

### Kulturo:

Tragedio de ĵaba-oj . . . . .	36
Sincera koro, fonto de entuziasmo . . . . .	41

<b>Por via sano:</b> Masaĝo por forigi sendormecon . . . . .	43
--	----

<b>Popola vivo:</b> Kiel vivas kripluloj en Ĉinio . . . . .	46
---	----

<b>Nunaj ĉinoj:</b> Ĉina juĝisto de la Internacia Kortumo de Justico . . . . .	44
--	----

<b>Historia objekto:</b> Ĉarmaj bludesegnaj porcelanaĵoj . . . . .	60
--	----

<b>Vojaĝo tra Ĉinio:</b> Ĝengĝoŭ kun “pendanta” rivero, historiaj restaĵoj kaj famaj temploj . . . . .	31
--	----

<b>Enciklopedieto de Ĉinio:</b> Ĉinaj naciecoj . . . . .	62
--	----

<b>Internacia problemo:</b> Por nova internacia ordo de informado . . . . .	65
---	----

<b>Kurantaj aferoj</b> . . . . .	49
----------------------------------	----

Sur la kovrilo: Ĉina stevardino

Foto de **SEN ĈEN**

Sur la dorskovrilo: Porcelana botelo de Ming-dinastio (1368-1644)

Interne de la kovrilo: Printempa kamparo

Foto de **GAŬ MINGJI**

Interne de la dorskovrilo:

1. Insuletaro apud Goterborg de Svedio
2. Betula lageto

Fotoj de **GERARD GERRITSE** (Nederlando)

JARABONTARIFO		Francio	FF	60.00	Japanio	Yen	2 000.00	Usono	US\$	10.00
Aŭstralio	\$A	FR Germanio	DM	18.00	Jugoslavio	Din.	300.00	Kanado	Can\$	10.00
Britio	£	Hispanio	Pts	900.00	Nederlando	Gld.	22.00			
		Italio	Lit	11 000.00	Portugalio	Esc.	700.00			
Por aliaj landoj en Eŭropo:	£	5.00	US\$	8.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:			£	2.80	US\$ 4.00

# Esploro pri la ĉinaj urbetoj kaj ilia industrio

*La 75-jara profesoro Fej Ŝjaŭtong estas fama ĉina sociologo. Jam en la meza periodo de la tridekaj jaroj li okupiĝis pri socia esplorado de sia malgranda hejmvilaĝo Ĝjangcun apud la lago Tajhu. En 1938 li verkis la disertacion "La Kamparana Vivo en Ĉinio" kaj gajnis soci-antropologian doktorecon en Britio. En 1981 li ricevis Huxley-medalon de la Reĝa Antropologia Instituto de Britio, la plej altan premion de la internacia antropologio.*

*Prof. Fej longtempe instruis en alta lernejo, sed li ĉiam direktis sian rigardon al la kamparo kun 80% de la ĉina loĝantaro. En la lastaj tri jaroj, post kiam li publikigis sian artikolon "Ŝanĝiĝo de Kaixiangong" (Vd. la 6-an n-ron de EPC, 1982), li vizitis 11 subprovincojn de Ĝjangsu-provinco kaj, surbaze de esploro pri la historio kaj nuna stato de iuj guberniaj urboj kaj urbetoj, verkis tri disertaciojn kun ĉ. 70 000 ideografiaĵoj. Li opiniis, ke por modernigi sian kamparon, Ĉinio bezonas multajn urbetojn.*

*Limigite de la paĝoj, ni povas citi nur fragmentojn de liaj artikoloj. La titolo kaj subtitoloj estas faritaj de ni.*

— LA RED.

Mia esploro pri urbetoj komenciĝis post tiu pri vilaĝo. Dum mia triafoja vizito al Ĝjangcun (Kaixiangong) en 1981 mi observis nur unu vilaĝon, sed dum mia kvarafoja vizito al ĝi tuj en la jarfino mi komencis esplori urbeton kiel politikan, ekonomian kaj kulturan centron de la kamparo. Mi vizitis urbetojn de Uĝjang-gubernio kaj trovis, ke ili iras de malprospero al florado. Tial mi decidis, ke ekde 1982 mi prenos urbetojn kiel la ĉefan objekton de mia esplorado.

En 1983 la Ĉina Popola Politika Interkonsilia Konferenco organizis urbeto-enketan grupon el diversaj fakuloj de Pekino kaj Nankino por viziti la subprovincojn Ĉangĝoŭ, Uŝji, Nantong, Suĝoŭ kaj iujn guberniajn urbojn kaj urbetojn. La vizito min impresis kiel jene.

## KAMPARANOJ RIĈIĜAS DE INDUSTRIO

La prospero de la kampara ekonomio revigliĝis la urbetojn. En la kvin jaroj post la Tria Plena


Sesio de la 11-a Centra Komitato de KPCĈ en 1978, en la kamparo efektiviĝis diversaj novaj ekonomiaj politikoj kaj rimarkinde progresis la agrikultura produktado en la tuta lando, escepte de malmultaj lokoj. La kamparanoj riĉiĝas efektive.

En 1982 la kamparanoj en Ĝjangsu-provinco enspezis meznombro 309 jŭanojn (2.7 jŭanoj = unu usona dolaro), je 154 jŭanoj pli multe ol en 1978. En tiuj jaroj la totala produktokvanto de greno, kotono kaj manĝ-oleo kreskis meznombro je pli ol 4% kaj tiu de iuj ĉefaj kromproduktoj superis 10%. Ankaŭ la totala produktovaloro de la urbeto-industrio (entreprenoj funkciigataj de komunumoj kaj produktaj brigadoj) duobliĝis en la kvar jaroj, konsistigante 42% de la totala produktovaloro de la kamparaj industrio kaj agrikulturo (entreprenoj funkciigataj de produktaj taĉmentoj estas inkluditaj de agrikulturo) kaj konsistigante kvaronon de la totala industria produktovaloro de la provinco.

En la lokoj vizititaj de ni jam transformiĝis la domoj de kamparanoj. En Nantong sur la norda bordo de Jangzi-rivero oni komencis anstataŭigi kabanojn per brikaj domoj kaj en Suĝoŭ, Uŝji kaj Ĉangĝoŭ sude de la rivero oni komencis anstataŭigi unuetaĝajn brikajn domojn per pluretaĝaj. Iuj duetaĝaj domoj, kun balkonoj plenaj de floroj en potoj, similaj al vilaoj etendiĝas kelkajn kilometrojn. Ambaŭflanke de larĝaj stratoj en urbetoj staras nove konstruitaj magazenoj, kinejoj kaj kulturaj domoj. La entuziasmo por dom-konstruado aperinta en la lokoj riĉaj je fiŝoj kaj rizo montras, ke riĉiĝo puŝis kamparanojn plibonigi sian loĝkondiĉon. Kamparanoj ne povas tuj forkonsumi sian enspezon ricevitan el var-produktado. En la fino de 1982 la monsumo deponita de Ĝjansu-aj kamparanoj atingis du miliardojn da jŭanoj. La mono, kiun ili rezervis por si, eble superis tiun sumon. Laŭ ilia kutima penso ili postulas ŝanĝi la superfluan kapitalon en nmoveblan posedaĵon. Jen naskiĝis ilia motivo por dom-konstruado.

La ŝanĝiĝo de la kampara ekonomia strukturo estas la ĉefa kaŭzo de la riĉiĝo de kamparanoj de tiu provinco. En tiuj jaroj la agrikulturo, kromokupo kaj industrio de Ĝjansu progresis kun malsamaj rapidecoj. Inter ili la produktokvanto de ĝia agrikulturo kreskis plej malmulte (ĉ. 4%) kaj la produktovaloro de ĝia urbeto industrio kreskis plej multe (ĉ. 90%). Mi prenu guberniojn de la esploritaj subprovincoj kiel kalkulan unuon. Ilia industria produktovaloro preskaŭ atingis aŭ jam superis duonon de la totala produktovaloro, precipe tiu de la gubernioj de la tri subprovincoj sude de la rivero ĝenerale superis 70%. Ke kamparanoj riĉiĝas de industrio, tio jam fariĝas videbla fakto.

En la komenca periodo de industriigo en Eŭropo, kiam la maŝina industrio prosperis en urboj, la bankrotintaj kamparanoj devigite forlasis sian hejmlokon kaj torentis en urbojn por fariĝi rezervaj laborfortoj por la nova industrio. En Ĉinio nun aperis tute malsama fenomeno: Surbaze de la agrikultura prospero, kamparanoj kun granda entuziasmo starigis kolektivajn entreprenojn de urbeto industrio. Tiaj entreprenoj antaŭ ĉio akcelas, helpas kaj firmigas la agrikulturan ekonomion, por ke la agrikulturo, kromokupo kaj industrio kune progresu kaj harmonie disvolviĝu. Tia vojo de industriigo estas kreita de la kamparanoj mem en la reala vivo, provita en plurjara praktiko, ke "centmilionoj da kamparanoj forlasintaj agrojn kaj ne la hejmlokon aktive disvolvas urbeto industrian", kaj fine difinita kiel principo laŭ la ĉina cirkonstancaro, kun strategia signifo.



*Dizelaj motoroj produktitaj de Uŝji*

## PROSPERO ALPORTITA DE URBETA INDUSTRIO

La prospero de urbetoj estas ĉefe kaj rekte estigita de la rapida disvolviĝo de urbeto industrio.

Oni diris, ke la urbeto industrio de suda Ĝjansu aperis en la komenco kaj mezo de la sepdekaj jaroj, tiam estis nur malmultaj kaj malgrandaj fabrikoj. Post 1978 ili kreskis kiel fungoj post printempa pluvo. Ekz., en 1970 Ĉangĝoŭ-komunumo de Uŝji-gubernio havis nur unu fabrikon de agrikulturaj maŝinoj, kun 12 laboristoj, kaj ĝia industria produktovaloro estis nur 1 500 000 jŭanoj, sed en 1982 ĝi jam havis multajn fabrikojn kun pli ol 7 700 laboristoj kaj ĝia industria produktovaloro atingis 73 880 000 jŭanojn. Ekde 1978 la produktovaloro kaj profito de la urbeto industrio en la tuta subprovinco Uŝji ĉiujare kreskis respektive je 23% kaj 7%.

La kaŭzon de tio oni povas trovi nur en la internaj rilatoj inter la urbeto industrio kaj agrikulturo. Suda Ĝjansu estas regiono kun longa historio de agrikulturo kaj la disvolviĝo de ĝia agrikultura ekonomio allogis pli kaj pli da homoj kaj faris la lokon dense loĝata. Por solvi la kontraŭdiron inter la granda loĝantaro kaj malmulta agraro, jam delonge oni disvolvis tie familian metion, surbaze de stabila disvolviĝo de agrikulturo.



*Teknikisto de la Fabriko de Komputermemoriloj en Tangĉjaŭ de Suĝoŭ kontrolas produktaĵojn.*



Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 la agrikulturo de suda Ĝjangsu transiris de individua ekonomio al kolektiva ekonomio kaj ĝia produkta forto akiris senprecedencan liberiĝon. Tamen, ĉar la loĝantaro iam ekspansiis senbride, la kontraŭdiro inter la tro multa loĝantaro kaj tro malmulta agraro fariĝis ĉiam pli akra. La meznombra pokapa agro de la kvar subprovincoj en la komenco de la sepdekaj jaroj malleviĝis al ĉ. 1/15 hektaro. Antaŭ 1978 la kampara politiko estis influata de la "maldekstra" penso. Tiam oni okupiĝis nur pri grena produktado, kio detruis la tradician strukturon de agrikultura kaj industria interkompletigo en tiu loko. Pli kaj pli da agrikulturaj laborfortoj trovis neniun alian vojon ol fari malracian ekspluatadon de tre malmulta tero per duobla kosto. Tio pliigis la produktokvanton, sed ne la enspezon.

La superflujaj laborfortoj en kamparo serĉas vivrimedon, kio estas la interna kaŭzo de la apero kaj disvolviĝo de la urbeta industrio. Nia enketo pri la kamparo de la kvar subprovincoj montras, ke se ĉiu laborforto havas meznombro 4/15 hektaron, do troviĝas pli ol triono da superflujaj laborfortoj. Tuj kiam ili eklaboras en fabrikoj funkciigataj de ili mem, ili fariĝas nova produkta forto en la kamparo. En 1978, post kiam la respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado estis praktikata en la kamparo, preskaŭ ĉiuj familioj havis superflujajn laborfortojn por okupiĝi pri alia profesio ekster la agrikultura produktado. Sekve de tio la urbeta industrio prosperis ĉie.

La disvolviĝo de la urbeta industrio prosperigis la urbetojn. Ŝinta-komunumo de Uĝjanggubernio en la subprovinco Suĝoŭ antaŭe produk-

tis nur grenon kaj bredis nur porkojn kaj la kamparanoj ĉiujare enspezis nur 150 jŭanojn. La urbeto, kie situas la komunumo, havis nur kadukiĝantajn loĝdomojn kaj du ĉeriverajn stratojn larĝajn je nur 3 metroj. Nun la urbeto havas tute novan fizionomion. Tie aperis multaj novaj fabrikoj kaj loĝdomoj, kinejo kun pli ol mil seĝoj kaj kvartalo kun strato larĝa je 18 metroj. Por ilia konstruado oni investis 3 568 000 jŭanojn kies 72% estis elprenitaj el la publika akumulo de la 13 fabrikoj funkciigataj de la komunumo.

En 1983 la industriaj entreprenoj de la provinco Ĝjangsu donis al la ŝtato 1.1 miliardojn da jŭanoj, kiuj konsistigis okonon de la tuta financa enspezo de la provinco. De 1979 ĝis 1983 pli ol 20% el la profito de la urbeta industrio uziĝis por aĉeti agrikulturajn maŝinojn, fari fundamentan konstruadon de kampoj kaj kolektivajn bonstatigan aferojn kaj konstrui urbetojn. La totala monsumo por tio atingis 1.45 miliardojn da jŭanoj. En tiuj jaroj la totala salajro de la urbeta industrio kaj ties profito al la produktaj taĉmentoj estis 5.99 miliardoj da jŭanoj. Laŭ statistiko de kvin gubernioj de la subprovinco Suĝoŭ, el la 255 jŭanoj, kiujn ĉiu kampara loĝanto meznombro ricevis de la kolektivo en 1982, 130 jŭanoj venis de la urbeta industrio.

La rolo de la urbeta industrio financi la agrikulturan produktadon kaj akceli la ĉiuf flankan disvolvon de agrikulturo, kromokupo kaj industrio similas tiun de la antikva familia metiindustrio de kamparanoj. Sed nun la interkompletigo de agrikulturo kaj industrio ne plu prenas familion kiel unuon, sed portas karakterizaĵojn de kolektiva ekonomio. Tiu progreso rapide ŝanĝas la fizio-



*Aŭtofabriko en Leju, Saĝoŭ-gubernio*

Foto de ĈEN ĜE

nomion de la kamparo kaj garantias riĉiĝon al la kamparanoj.

### **SUPERFLUAJ LABORFORTOJ EN AGRIKULTURO EKHAVIS PROFESION**

Dank' al la disvolviĝo de la urbeta industrio, grandaj superfluaĵ laborfortoj akiris profesion. Laŭ statistiko de la subprovinco Uŝji, la urbetaj entreprenoj de Uŝji havas laborfortojn konsistigantajn 34% de tiuj de la kamparo. Preskaŭ same status la aliaj tri subprovincoj. Tio signifas, ke en suda Ĝjangsu triono de la kamparaj laborfortoj forlasis la agrikulturan produktadon. La totala nombro de la oficistoj kaj laboristoj de la urbeta industrio en la provinco atingis pli ol 4 000 000 homojn, preskaŭ kiom tiu de la urba industrio en la provinco. Tio certgrade mildigis la loĝantaran premon en la kamparo kaj tiu parto de kamparanoj komencis partopreni en la industria produktado per nova laborrimedo. Tiel formiĝis en la kamparo de Ĝjangsu labora armeo karakterizita per kombino de kamparanoj kaj laboristoj.

La urbetaj fabrikoj, kiujn mi vizitis, varbis unu homon el ĉiu kamparana familio. Tio ebligas al ĉiu kamparana familio havi pli-malpli egalan enspezon kaj utilas al la agrikultura produktado. La laboristoj el kamparanaj familioj povas fari kamplaboron, fininte la fabrikan laboron. En la kvar subprovincoj la nombro de tiaj familioj konsistigas ĉ. 80% de la totala nombro de la kamparanaj familioj.

Dum la enketado ni trovis, ke inter tiaj laboristoj kaj la urbaj laboristoj ne ekzistas esenca

diferenco. Tiaj laboristoj, ŝarĝitaj per triono de la urbet-industria produktado, ricevis laŭdojn pro sia diligenteco. Multaj el ili fariĝis ĉefproduktistoj aŭ kapablaj administrantoj. Sendube, ili apartenas al la nova generacio de la ĉina laborista klaso.

La kamparaj laboristoj ne nur influas la socialan strukturon, sed ankaŭ ŝanĝas la dissemiĝon de la loĝantaro. En la pasintaj jaroj ekzistis tia fenomeno: multaj loĝantoj fluis al grandaj kaj mezgrandaj urboj kaj nemalmultaj ekloĝis en vilaĝoj. Tio kaŭzis loĝantaran ekspansion en la grandaj kaj mezgrandaj urboj kaj seriozan superfluan de laborfortoj en la kamparo. Samtempe kun tio, la loĝantaro de guberniaj urboj kaj urbetoj reduktiĝis relative, kaj estiĝis granda diferenco en loĝantara dissemiteco.

Post 1978 la industrio de gubernioj, urbetoj, komunumoj kaj produktaj brigadoj disvolviĝis rapide, kun guberniaj urboj kaj urbetoj kiel bazo. Grandaj superfluaĵ laborfortoj de la kamparo venis al tiuj urbetoj por labori, kio kreskigis la nombron kaj ŝanĝis la strukturon de la loĝantaro de tiuj urbetoj. Mi prenu kiel ekzemplon la urbeton Ĉingjang de Ĝjangjin-gubernio, Ĉangĝoŭ-subprovinco. Ĝi havis 5 500 loĝantojn en 1950 kaj 5 885 en 1960, kaj ĝia loĝantaro pliiĝis je nur 7% en dek jaroj. En la sepdekaj jaroj la urbeta industrio komencis uzi kamparajn laborfortojn. En la jarfino de 1982 la urbeto havis 15 366 loĝantojn, inter kiuj estis 5 114 kamparaj laboristoj konsistigantaj 33% de ĝia totala loĝantaro. La procento estis meze granda en suda Ĝjangsu. Tiuj laboristoj loĝis plejparte en sia hejmvilaĝo kaj ĉiutage moviĝis inter la urbeto kaj kamparo, tiel ke la guberniaj urboj kaj urbetoj malebligis al la superfluaĵ kamparaj laborfortoj blinde flui al grandaj kaj mezgrandaj urboj. La guberniaj urboj kaj urbetoj sub gubernio ludis rolon malhelpi moviĝon de loĝantoj al grandaj kaj mezgrandaj urboj kaj per tio reduktis la loĝantaran premon de tiuj urboj. Tia fenomeno forlasi agroj kaj ne la hejmlokon devas esti esplorata kiel unu el la konkretaj rimedoj por solvi la loĝantaran problemon de Ĉinio.

En la enketo ŝajnis al mi, ke mia espero en la pasintaj kelkdek jaroj tuj fariĝos realaĵo antaŭ miaj okuloj. La veraj industriigo kaj modernigo de la kamparo certe aperos en la socialisma Ĉinio. Samtempe mi ankoraŭ ne tute komprenas iliajn multajn profundajn signifojn kaj historiajn fenomenojn, kiujn mi devas daŭre observi kaj pripensi.

## En kamparaj urbetoj

**P**OST deĵoraj horoj amasoj da laboristoj puriĝintaj kaj transvestiĝintaj forlasas kun siaj bicikloj fabrikojn, babilante kaj ridante, kaj poste disrajdas al diversaj direktoj — jen tute ordinara fenomeno ofte vidita en ĉinaj urboj. Tamen kiam la saman fenomenon mi vidis en la kamparo de Suĝoŭ, mi havis grandan ĝojon.

Suĝoŭ troviĝas en la suda parto de Ĝjangsu-provinco. En la pasintaj jaroj en la vasta kamparo de Ĉinio, regis unuopa-produkta agrikultura ekonomio. Ekde la 50-aj jaroj aperis tie kelkaj metiejoj de feraĵoj, lignaĵoj kaj bambuaĵoj kaj prilaborejoj de greno, kotonono, oleo kaj alkoholaĵo. Nur en la mezo de la 70-aj jaroj, precipe post 1978, modernaj industriaj entreprenoj prospere leviĝis kiel bambuido post printempa pluvo. La statistiko de la jaro 1983 notis, ke en la kamparo de Suĝoŭ jam estas 8 059 fabrikoj funkciigitaj de subdistriktoj, urbetoj aŭ vilaĝoj, kun 725 000 laboristoj. Interalie pli ol 2 500 fabrikoj kun 250 000 laboristoj troviĝas en guberniaj kaj subdistriktaj urbetoj. La leviĝo de tiuj industriaj entreprenoj ne nur akcelis la senĉesan prosperiĝon de kamparaj urbetoj, sed ankaŭ multe ŝanĝis la fizionomion de la vasta kamparo.

### ŜANĜIĜO DE STRATOJ EN URBETO


Kiam ni vizitis la urbeton Tangĉjaŭ, kie funkcias la registaro de Tangĉjaŭ-subdistrikto, ni rigardis ĝiajn stratojn akompanate de gastiganto.

En ĝia suda parto troviĝas strato tuj apud rivereto, 600 metrojn longa kaj pavimita per ŝtonaj platoj. Ĝi formiĝis ĉirkaŭ la jaro 1938. La gastiganto tiel figuris ĝian mallarĝecon: "Se vi irus en ĝia mezo dum pluvo kun ombrelo

super via kapo, akvo falus de tegmentoj ambaŭflanke sur vian ombrelon." Li ne troigis la fakton. Paŝante sur tiu malnova strato inter du vicoj da malaltaj, dense vicigitaj domoj, mi vere sentis ĝian preman malvastecon. En la pasinteco la urbeto havis nur malfortajn ekonomiajn aktivadojn de komerco, publika servo kaj metioj, la mizereco de la malnova strato ĝuste respondis al tiu postĝinta produktiveco.

En 1958 oni malkonstruis nombron da domoj kaj larĝigis la mezan parton de la strato, ĉirkaŭ

*Laborejo de la Kemifibra Teksejo de Tangĉjaŭ*





100 metrojn longan. La subdistrikta registaro deziris ŝanĝi la fizionomion de la urbeto siatempe, sed post la parta larĝigo de la strato, ĝi ne sukcesis starigi ĉe ĝi butikojn pro manko de necesaj monaj rimedoj, tiel ke la strato restas en malprospereco.

Nun la urbeto jam translokis sian centron al sia norda parto, kie de post la jaro 1978 la subdistrikta registaro konstruigis novan straton paralelan kun la malnova. La nova larĝa strato longas je pli ol 1 700 metroj kaj estas cimente pavimita kun trotuaroj tegitaj per cementaj platoj kaj borderitaj per arboj. Laŭ la strato viciĝas novaj etaĝdomoj, inter kiuj troviĝas magazeno, domo por nutraĵoj, ekspozicio-vendejo de la Industria Kompanio, kultura centro, librejo, hotelo, banko, poŝtoŝtanco, la ofic-domo de la subdistrikta registaro ktp. La gastiganto diris al ni, ke baldaŭ konstruiĝos ankaŭ klimatizita kinejo, kiu kapablos akcepti pli ol mil spektantojn. Antaŭ 1978, la urbeto havis konstruaĵojn kun plankareo de 30 000 kvadrataj metroj, nun ĝi grandiĝas kvaroble kaj havas konstruaĵojn kun plankareo de pli ol 130 000 kvadrataj metroj. Ŝoseoj ligas la urbeton kun la 17 vilaĝoj de tiu subdistrikto kaj faris ĝin vera centro politika, ekonomia kaj kultura de la loko.


La ŝanĝiĝo de la urbeto estas nedisigebla disde la leviĝo de ĝiaj industriaj entreprenoj. Ekde

1978 starigis sume 26 fabrikoj funkciigitaj de la subdistrikto kaj 86 de ĝiaj vilaĝoj, ili ĉefe estas malpezaj kaj tekstilaj, inkluzive ankaŭ maŝinajn, elektronajn, kemiindustriajn kaj konstru-materialajn. En 1983 la produktovaloro de tiuj entreprenoj estis 91.91 milionoj da jŭanoj (2.7 jŭanoj = 1 usona dolaro) kaj okupis pli ol 90% de la totala produktovaloro de la industrio, flankokupoj kaj agrikulturo de la tuta subdistrikto. De la jaro 1979 la diversaj entreprenoj funkciigitaj de la subdistrikto donis al ĝia financa departemento profiton de 5 milionoj da jŭanoj, tio pretigis al la subdistrikta registaro kompare solidan materian bazon por konstrui la urbeton kaj disvolvi la kulturan, edukan, higienan kaj trafikajn aferojn en la loko.

### SCIENCAJ KAJ KULTURAJ SCIOJ ALTE TAKSATAJ


Dum nia vizito nin interesis laboristo-varbilo kune publikigita de kvar fabrikoj subdistrikte funkciigitaj. La varbilo ne nur difinis la aĝon kaj edukitecon de kandidatoj, sed ankaŭ diris, ke la fabrikoj faros sian elekton inter la kandidatoj nur post klareco-ekzamenoj. La kandidatoj estos ekzamenitaj pri la ĉina lingvo, matematiko kaj, ĉe du el la kvar fabrikoj, aldone pri fremda lingvo. Tiu ordinara varbilo malkovris al ni ĝojindan no-

*Kampanoj rapidas al fabrikoj por labori.*





*Industria ekspozicio en Ŝaĝoŭ*



*Loĝdomoj en la urbeto Jangŝe*

vajon: la kamparo urĝe bezonas sciencajn kaj kulturajn sciojn kaj jam komencis doni al ili atenton.

Kontraste kun la pasinteco, kiam la kamparo ĉe Suĝoŭ liveris nur agrikulturajn kaj kromokupajn produktojn al nur kelkaj najbaraj urboj, nun ĝi, dank' al la starigo de diversaj fabrikoj, pre-

zentas al pli ol dek grandaj kaj mezgrandaj urboj produktojn ne nur agrikulturajn kaj kromokupajn, sed ankaŭ industriajn. Iuj produktoj eĉ aperas en eksterlandaj merkatoj. Por garantiĝi al siaj produktoj nevenkeblan pozicion inter la industriaj produktoj progresantaj kun la paso de ĉiu tago, tiuj fabrikoj devas posedi merkatajn informojn kaj altigi siajn teknikajn nivelojn kaj administran kapablon. En ĉio ĉi sciencaj kaj kulturaj scioj estas nepre necesaj.

Ni vizitis la Ŝaĝoŭ-an Fabrikon de Komputermemoriloj. La fabriko, funkciigita de subdistrikto, kun nur 207 laboristoj kaj oficistoj, ne nur fondis teknikajn kursojn, en kiuj profesiaj instruistoj donas lecionojn al laboristoj, sed ankaŭ teknikan konsultiĝan grupon konsistantan el profesoroj, vicprofesoroj, esploristoj kaj inĝenieroj el famaj universitatoj kaj sciencaj institutoj en Pekino, Ŝanhajo kaj Nankino, por kulturaj teknikistojn kaj doni konsilojn en produktado, tiel ke la teknika nivelo de la fabriko rapide altiĝis. En 1983, kiam Ĉinio lanĉis eksperimentan sateliton, oni uzis duonkonduktantan memorilon projektitan kaj produktitan de tiu malgranda fabriko.

En la kamparo de Suĝoŭ oni povas vidi multe da similaj ekzemploj: La ajut-fabriko funkciigita de Fuŝan-subdistrikto, dank' al la teknika kunlaboro kun altlernejoj, prove produktis hermetikan ole-ajuton, kiu povas multe helpi al la ŝparado de energio, kaj tial ricevis de la ŝtato triagradan premion por gravaj sciencaj kaj teknikaj inventoj. La sveter-fabriko de Biŝji-subdistrikto sendis siajn kamparan-devenajn laboristojn al grandaj fabrikoj en Ŝanhajo por lerni teknikojn kaj per tio sukcesis produkti bon-kvalitajn sveterojn, kiuj estas permesitaj de la ŝtato kiel eksportaj varoj sen bezono de ekzameno kaj ŝatataj de klientoj en Usono, Britio, Japanio, Sovetunio, Aŭstralio, FR-Germanio kaj aliaj ĉirkaŭ 20 landoj kaj regionoj.

La funkciigo de fabrikoj fortigis la ekonomion en la kamparo de Suĝoŭ, kaj nun en ĝiaj multaj lokoj oni jam komencis praktiki senpagan edukadon de la elementa lernejo ĝis la supera mezlernejo. Se gefiloj de kamparanoj sukcesas eniri en altlernejon, ili povas ricevi po 80-100 jŭanojn ĉiujare kiel stipendion. Ŝaĝoŭ-gubernio starigis en la urbeto Jangŝe profesionan inĝenieradan instituton ekskluzive por kulturaj teknikistojn por siaj industriaj entreprenoj kaj koncernaj departemen-

*(Daŭrigo sur p. 17)*

# Industrioj de Uŝji

*En la Fabriko de Elektraĵ  
Ventumiloj en Jangŝu*



*Televidila muntejo en Jan-  
ĉjau*






*Laborejo de la Fabriko de Radio-  
frekvencaj Kapoj en la urbeto  
Jangŝi*



*Aŭtoj produktitaj de Aŭto-fabriko  
de Ŝuoŝang*



*Elementa lernejo konstruita per  
profito de la industriaj entreprenoj  
de Dangkoŭ*

*Fabriko de eksportotaj ludiloj*

*La Fabriko de Vitrofibra Plasto en  
Hongŝeng produktas ŝipojn el tia  
plasto.*




MALFERMITAJ URBOJ

# Ĉinhŭangdaŭ, la plej granda karbohaveno de Ĉinio

de ĜENG ĜENGJE

Fotoj de LAŬ BAJ



*Nova karbokajo*

*Brita kargoŝipo pilotata*

Foto de SUN GŬOĜU




*La somerumejo Bejdajhe*



**Ĉ**INHŬANGDAŬ situas en nordorienta Hebej-provinco kaj bordas Bohaj-maron. Ĝi, kun dorso alkroĉiganta al la kontinua Jansan-montaro kaj fronto limanta la maron, estas pordo de Pekino kaj Tjanĝin kaj la strategia pasejo inter la vastaj ebenaĵoj de norda kaj nordorienta Ĉinio.

La urbo Ĉinhŭangdaŭ konsistas el la distriktoj Ĉinhŭangdaŭ, Ŝanhajgŭan kaj Bejdajhe kaj kvar gubernioj en la ĉirkaŭaĵo. Kiel bela rubando ĝi zigzage iras laŭ la marbordo. La urbo kovras areon de 7 721 kvadrataj kilometroj kun 2.3 milionoj da loĝantoj.

La mara kaj tera trafiko de la urbo estas tre oportuna. Ĝin trairas la Pekino-Ŝenjang-a Fervojo kaj la Ŝenjang-Pekin-a Ŝoseo. La finkonstruita Pekin-Ĉinhŭangdaŭ-a Elektrizita Fervojo kaj la konstruata Datong-Ĉinhŭangdaŭ-a Fervojo ligiĝas kun la kajoj de Ĉinhŭangdaŭ, kio faciligas transporti karbon el Ŝanŝji-provinco kaj ludas gravan rolon en ekspluatado de karba riĉfonto. La haveno estas vasta, akvo pro-



*Parto de Ĉinhŭangdaŭ*

funda, senaluvia kaj neglaciigita. Tial ĝi estas naturdotita haveno en norda Ĉinio. La haveno havas 13 ŝiphaltejojn kun la jara elŝarĝa kapablo de 30 milionoj da tunoj, nur malpli ol la havenoj de Ŝan-

*Butiko de la Marista Klubo*

Foto de SUN ĜUOGU



hajo kaj Daljan. La rapide disvolviĝanta haveno Ĉinhŭangdaŭ fariĝos la plej granda energio-eksporta haveno de Ĉinio kaj la plej granda karbohaveno en la mondo.

En la urbo troviĝas 696 industriaj entreprenoj, el kiuj la ĉefaj estas tiuj de konstruaj materialoj, malpezaj industrioj, manĝaĵoj kaj pontoj. Inter ili estas 27 vitrofarejoj kun pli ol 50 variaĵoj de produktaĵoj en 10 specoj, tial la urbo portas la nomon "vitra urbo". Tie estas la plej granda vitrofarejo Jaŭhŭa de Ĉinio, kiu produktas jare 4 milionojn da kestoj da vitroplatoj, 0.8 milionon da kestoj da premdesegnitaj vitroplatoj, dek mil tunojn da vitroglobetoj, 260 000 kvadratajn metrojn da sekurecvitro kaj dek mil kvadratajn metrojn da tavoligita vitro. Sub la direktado de la malferma politiko al la eksterlando la vitrofarejo planas entrepreni delikatan prilaboron de vitro, instali avan-

gardajn produktajn liniojn kaj anstataŭigi malnovajn fornojn per novaj, por ke la jara produkto-kvanto en la 90-aj jaroj atingu 17 milionojn da normaj kestoj da vitro.


La urbo havas multajn montetojn. Sur la nordaj montaroj kreskas densaj arbaroj, kiuj donas abundon da vinberoj, persikoj, juglandoj, kaŝtanoj k.a. En la montetaroj estas 130 000 hektaroj da herbejoj. Ĉe la marbordo abundas salikokoj, holoturioj kaj kraboj. Krome, estas ankaŭ malprofunda maro kun areo de ĉ. 13 000 hektaroj, kaj strando kun areo de ĉ. 7 000 hektaroj. Tio liveras tre bonajn kondiĉojn por kulturi akvoproduktaĵojn kaj disvolvi sal-kemian kaj prilaboran industriojn. En la nordaj montaroj konserviĝas diversaspecaj mineraloj, kiel ekz. sablo, kalkoŝtono, granito, marmoro, kvarco, karbo, fero, plumbo, zinko, oro, arĝento, grafito ktp. La sablo de

konservkvanto de 400 milionoj da kubaj metroj estas delikata, malmulte da koto entenanta kaj sorbema. Tial ĝi estas bona materialo por konstruado.

La plaĝo Bejdajhe estas komforta somerumejo kun sanatorioj, fama kaj por Ĉinio kaj por aliaj landoj. La marbordo longa je 10 kilometroj estas zigzaga kaj ebena. Tie la klara marakvo servas kiel natura banejo. La loko estas tutjare taŭga por familia aŭ grupa restado, kuracado kaj feriado kaj ankaŭ taŭga por okazigi internaciajn kaj enlandajn konferencojn. Prezentiĝas aparta ĝojo en somero, ke oni tage banas sin kaj ludas en la maro kaj grimpas sur monteton, matene kaj vespere promenas sur la plaĝo, kolektas konkojn kaj fiŝhokas kaj nokte aŭskultas susuradon de arboj kaj plaŭdon de ondoj. En ĉefsezona somero al la loko ĉiutage venas pli ol 50 000 turistoj.

*Ŝarĝata ŝipo*

Foto de ĜI ĜU







*Haveno*

Foto de ĜI ĜU


Ŝanhajgŭan estas grava pasejo de la orienta ekstremo de la Granda Muro. Ĝi, kiel strategia


loko, sidas sur la trafika nodo de la Nordoriento kaj norda Ĉinio. Se oni rigardas norden sur la

fama turo kun horizontala tabulo surhavanta la ĉinajn ideogramojn "Unua Pasejo en la Mondo", oni

*Karbejo*

Foto de ĜI ĜU





*En la vitrofarejo Jaŭhŭa*

vidas, ke la Granda Muro kiel giganta drako zigzagas en la montaro Janŝan; se oni rigardas suden, oni vidas, ke super la vastega Bohaj-mar-o mevoj flugas tien kaj reen. Ĉio ĉi sentigas agrablecon.

Aprilon de 1984 Ĉinhŭangdaŭ estis difinita kiel urbo malfermita al la eksterlando. Ĝis la fino de la sama jaro ekonomikistoj el Japanio, Usono, Britio, Singapuro, Aŭstralio, Belgio kaj Hongkongo venis al la urbo por fari esploron kaj negocan intertraktadon. Ili subskribis pli ol 70 protokolojn kaj interkonsentojn. La urbo subskribis 250 protokolojn, kontraktojn kaj interkonsentojn kun dekelkaj provincoj kaj urboj en la lando. La urbo faros investadon ĉefe al konstrumateriala industrio, elektronika industrio, mekanika industrio, manĝaĵa industrio, tekstila industrio, metiarto, agrikulturo kaj kulturado de

marproduktaĵoj. Krome, oni faros ankaŭ reformon al la malnovaj entreprenoj, konstruos ekonomian kaj teknikan regionon kaj turismajn lokojn.

La ekonomia kaj teknika regiono kuŝas inter la riveretoj Datang kaj Ŝjaŭtang, unu kilometron for de la haveno Ĉinhŭangdaŭ, kun areo de 2.4 kvadrataj kilometroj. En la regiono oni disvolvos ĉefe entreprenojn postulantajn koncentritajn teknikojn kaj sciojn. La regiono planas unue establi 16 industriajn entreprenojn per kuna investo de Ĉinio kaj aliaj landoj, kun totala investo-sumo de 470 milionoj da ĵuanoj. La turisma regiono situos ĉe la pitoreska marbordo Bejdajhe. Laŭplane tie konstruiĝos vilaoj, somerumaj vilaĝoj, cirkoj, banejoj, hoteloj kaj drinkejoj.

Diversaj specoj de investoj, inkluzive tiun de la entreprenoj, kiujn administros Ĉinio kaj alia

lando por pli ol dek jaroj, ĝuos favorojn. Oni ne impostos ilian enspezon en la unuaj du jaroj, post kiam ili akiros profiton, kaj racie malaltigos imposton de la uzata tero.

Nun la urbo streĉe konstruas bonan medion por investantoj eksterlandaj, inkluzive de dekmil-kanala telefonio programe regata kaj termoelektrejo. La vojoj de la du ekspluatataj regionoj kaj iliaj akvoproviza sistemo kaj kloakaro estas en streĉa instalado.



(Daŭrigo de p. 8)

toj. Nun kreskas generacio da novaj kamparanoj kleraj kaj tekniko-scipovaj.

### BELIGITA VIVO

Kien ajn ni iris en la kamparo de Suĝoŭ, vidiĝis vilaĝanoj konstruigantaj sian novan loĝdomon. Por kontentigi nian postulon viziti kamparanan familion, la juna estro de Ĉengŝji-vilaĝo apud la urbeto Jangŝe kondukis nin en sian vilaĝon.

La vilaĝo konsistas el 570 familioj kun 1 527 loĝantoj, sed ĝi disponas nur 18.2 hektarojn da agroj, nome, ĉiu homo nur 1.3 arojn. Sendube, estas malfacile por la vilaĝanoj sin riĉigi nur per terkulturado. En la lastaj jaroj la vilaĝo sinsekve starigis 5 fabrikojn de laktaĵoj (la lakton liveras la bovinejo de la vilaĝo mem), ŝtofoj, presado de fabrikmarkoj ktp., kiuj varbis en sin 550 superflujajn laborantojn de la vilaĝo. Tio multe plibonigis la ekonomian staton de la vilaĝo. Por kuraĝigi vilaĝanojn al konstruado de novaj loĝdomoj, la vilaĝo asignis apartan sumon da mono el la kolektiva akumulaĵo kiel tiucelan subvencion. La dispozicio de la nova vilaĝo estas unuece projektita, sed dom-formojn la vilaĝanoj elektas laŭ sia plaĉo.

Enirinte la vilaĝon, ni ekrimarkis antaŭ ni aĵuran muron kun ronda pordo. La muro en-

fermas duetaĝan domon ĉirkaŭitan de verando. La tuta konstruaĵo aspektas simpla kaj eleganta, kiel tiu en ĝardeno sude de Jangzi-rivero. Kiam nia vekita intereso nin tiklis, la mastro de la domo eliris kaj varme invitis nin — grupon da neatenditaj gastoj — en sian hejmon.

Li nomiĝas Ĝaŭ Ĝongŭej kaj laboras en ĉapfabriko en la urbeto. Lia edzino estas laboristino de ŝtof-fabriko funkciigita de la vilaĝo. La geedzoj povas enspezi 3 000 jŭanojn ĉiujare. Ili havas du infanojn. Liaj gepatroj estis terkulturistoj kaj nun estas pensiitaj de la vilaĝo ĉiumonate. Kiam ni, sub lia gvido, trarigardis kaj la malsupran kaj la supran etaĝojn kaj vidis en la 8 larĝaj ĉambroj lakitajn plankojn, murojn kun plasta tapeto, televidilon, stereo-radioricevilon, lavmaŝinon, ni konvinkiĝis, ke ili vivas eĉ pli komforte ol ordinaraĵoj urbanaj. Post tio la mastro kondukis nin al sia korto, kie, krom diversaj floroj, kreskas pirujoj, persikujoj, osmantuoj, vintraj umejoj (*Chimonanthus praecox*) kaj aliaj arboj. La mastro diris al ni fiere, ke li elspezis entute 2 000 jŭanojn por aĉeti arbidojn kaj konstruigi la aĵuran muron antaŭ sia domo.

Dum nia vizito ni vidis, ke ĉiuj novaj loĝdomoj en la vilaĝo aspektas bele kaj elegante. Hodiaŭ kamparanoj ne domaĝas monon por beligi sian viv-medion. Ĉu tio ne montras ĝuste ilian kontenton pri la vivo!

*Parko konstruita de kamparanoj de Ĝinfeng, Saĝoŭ-gubernio*



# Sekura kaj rapida servo de la ĉina civila aviado

**E**N la lasta aŭtuno, mi vizitis la Civilan Aviadan Administracion de Ĉinio (CAAC) kaj ricevis du raportojn. Unu el ili informas, ke kamparanoj de Donggŭan-gubernio, Gŭangdong-provinco en suda Ĉinio plurfoje organizis turismajn grupojn kaj veturis aviadile al Pekino kaj aliaj lokoj. La alia konigas, ke en la lastaj jaroj ĉiam pli multiĝis eksterlandaj turistoj kaj aliaj personoj veturintaj al Ĉinio per ĉinaj civilaj aviadiloj.

La du raportoj prezentis, ke ĉinaj kamparanoj riĉiĝas kaj havas monrimedojn veturi aviadile por turisma vojaĝo, CAAC ne nur liveras enlande oportunan aeron trafikon, sed ankaŭ povas kompari sin internacie kun diverslandaj flugokursoj kaj gajnas konfidon de pli kaj pli multaj pasaĝeroj per siaj bonaj servoj.

## OPORTUNAJ AERLINIOJ

Sen Tu, direktoro de CAAC, lastatempe aperigis artikolon, konigante, ke de la lastaj jaroj, impulsate de la moderniga konstruado kaj la malferma ekstera politiko de Ĉinio, CAAC havis pli

rapidan disvolviĝon. En 1950, ĝi havis nur 12 aerliniojn kaj transportis dek mil pasaĝerojn sed, en 1982, 162 aerliniojn kaj transportis 2 310 000 pasaĝerojn kaj en 1984, 214 aerliniojn kaj transportis pli ol 5 300 000 pasaĝerojn.

Nun en Ĉinio jam formiĝis aera trafika reto kun Pekino kiel la centro, funkcias pli ol 180 aerlinioj kaj ĉiusemajne pli ol 600 flugokursoj. Escepte de Taj'ŭan-provinco, ĉinaj civilaj aviadiloj kunligas multajn grandajn, mezajn kaj malgrandajn urbojn.

Konforme al la disvolviĝo de la turisma afero, de 1978 ĝis 1983, CAAC malfermis pli ol 20 aerliniojn al 40 turismaj urboj, interalie ĉiutage havas flugokursojn al 8 gravaj turismaj urboj. Nun, Pekino, Kantono, Ŝanhajo, Hangĝoŭ, Tjanĝin kaj Kunming havas flugokursojn al Hongkong. Sekve de la plimultiĝo de turismaj aerlinioj, ĉiam pli multiĝas turistoj ĉinaj kaj alilandaj en vizitado de famaj ĉinaj pitoreskejoj kaj vidindejoj.

La internaciaj aerlinioj de la nova Ĉinio ekfunkciis en 1950. Tiam malfermiĝis nur tri aerlinioj

al tri urboj de Sovetunio en landlimaj regionoj. En 1978, funkciis jam 12 internaciaj aerlinioj kaj en 1983 la nombro plimultiĝis ĝis 21 linioj. Nun CAAC havas flugokursojn al 23 urboj de 19 landoj, nome Tokio, Osako, Nagasako, Novjorko, San-Francisko, Los-Anĝeleso, Pjongjango, Rangun, Bankoko, Manilo, Karaĉio, Ŝarjah, Bagdado, Teherano, Moskvo, Londono, Bukareŝto, Parizo, Beogrado, Zuriko, Frankfurto, Adis Abebo kaj Sidnejo. La totala longeco estas 160 000 kilometroj. Nun, en la internaciaj flughavenoj de Pekino, Ŝanhajo, Kantono kaj Kunming ĉiusemajne estas 86 internaciaj regulaj en- kaj el-flugoj de ĉinaj kaj alilandaj aviadiloj, per kiuj pasaĝeroj povas oportune kaj rapide atingi diversajn lokojn tra la mondo.

## SEKURA FLUGO — LA PLEJ BONA SERVO

Antaŭ nelonge mi havis agrablan vojaĝon, veturante per aviadilo de CAAC de Pekino al Ŝanhajo kaj Hangĝoŭ.

Ĝi estas grandatipa pasaĝera aviadilo Boeing, destinita por



*Flughaveno de Gujlin en Gŭangŝji*

internaciaj flugoj. Sidante sur seĝoj en la larĝa pasaĝerejo, oni sentas komforton, kvazaŭ sidante sur sofoj hejme, kaj sentas nur iom skuon dum leviĝo kaj surteriĝo de la aviadilo. Tamen iu stewardino diris al mi, ke la pasintaj flugoj de ĉinaj aviadiloj ne ĉiam estis glataj. Oni renkontis eĉ grandan danĝeron, sed la aviadila personaro ĉiufoje venkis. Sekve ŝi sentoplene rakontis al mi jenajn historietojn.

Foje, sur sia revena vojo de Usono iu pasaĝera aviadilo renkontis en la aero super Ŝanhajo densan tondronubon. Se la aviadilo flugus kaj malsuprenirus tuŝante la tondronuban tavolon, ĝi estus trafita de fulmotondro, se ĝi flugus al Hangĝoŭ, ĝi ne havus sufiĉan hejtaĵon. En tia urĝa mo-

mento la ĉefpiloto decidis malle-vi la aviadilon ĝis la alteco de 300 metroj kaj glisi sub la tondronubo, kaj la aviadilo sekure surteriĝis.

En novembro de 1982, unu pasaĝera aviadilo de CAAĈ renkontis densan nebulon super Parizo kaj ne povis surteriĝi. La aviadilo tuj sin direktis al Liono por surteriĝi. Malfeliĉe, pro abrupta ŝanĝiĝo de la vetero, ankaŭ tie la aviadilo ne povis surteriĝi. Fine ĝi petis la flughavenon de Frankfurto pri prioritato surteriĝi.

Tiu decidema ĉefpiloto nomiĝas Ĝjang Ping. Kiam li estis nomumita ĉefpiloto antaŭ kvar jaroj, li aĝis nur 30 jarojn. Li sekure pilotis jam 15 jarojn. Nun li flugas sur 7 internaciaj linioj

de Pekino al San-Francisko, Parizo, Londono kaj aliaj urboj.

Mi vizitis la unuan flug-trupon de la Pekina Administracio de CAAĈ, kie laboras Ĝjang Ping. La trupo havas pli ol 200 pilotojn kun sekura flugo de kvin mil ĝis dek mil horoj. La trupo prenas sur si 90% de la internaciaj flugoj de CAAĈ. Neniu akcidento okazis al ĝi dum la pasintaj 28 jaroj.

Ĉu estas ia sekreto? Kun tiu demando mi intervjuis estron de la trupo Jin Ganting, kiu havas sperton de 34-jara pilotado. Ridetante li diris: "Niaj pilotoj havas unu aspiron, ke nur sekura flugo estas la plej bona servo al la pasaĝeroj. Kun tia respondeca spirito al la vivo kaj posedaĵoj de pasaĝeroj, ili ĉiuj diligente lernas memkonscie por perfektigi sian

teknikon, serioze traktas ĉiun flugon kaj povas superi ĉian ajn malfacilon.”

## SERVI AL LA PASAĜEROJ

CAAC nun klopodas por efektiviigi sekurajn, rapidajn, oportunajn kaj komfortajn servojn. Ili faras diskuton sub la temo “Se mi estus pasaĝero”, por ekzameni kaj plibonigi sian laboron.

Ĉar la transporta kvanto de pasaĝeroj kaj varoj rapide kreskis en la lastaj jaroj, aĉeti flugbileton fariĝis malfacile. Por mildigi la streĉitecon, CAAC pliigis ne nur flugokursojn sed ankaŭ biletvendan tempon. Komputiloj estas aplikataj por pritrakti biletendojn por la internaciaj aerlinioj kaj ankaŭ por enlandaj aerlinioj en Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono. Ekzemple, oni povas telefone mendi biletojn en hotelo aŭ ie ajn en malproksima loko kaj ricevi precizan respondon en dek sekundoj. Tio ŝparis al klientoj multan tempon.

Pasinte en la internacia flughaveno de Pekino, la pasaĝeroj de-

vis atendi 1-2 horojn por ricevi siajn pakaĵojn. Ili kritikis plendante, ke “Atendado de pakaĵoj en la pekina flughaveno egalas al la veturado per aviadilo”. La flughaveno akceptis la kritikon kaj plibonigis sian laboron. Nun oni bezonas atendi nur ĉirkaŭ 20 minutojn.

Krome, CAAC ankaŭ akiris rimarkindajn sukcesojn en akurata flugo kaj plibonigo de manĝaĵoj en aviadiloj kaj per tio ricevis laŭdojn de la pasaĝeroj ĉinaj kaj alilandaj.

La bonaj faroj de la ĉinaj stevardinoj en helpo de maljunuloj kaj infanoj, serĉado de perdaĵoj por pasaĝeroj kaj redono de kolektitaj perdaĵoj multe kortuŝis pasaĝerojn. Ekzemple, en majo pasintjare, en aviadilo fluganta de Pekino al Hongkong, iu s-ino preteratente faligis sian diamantan orelingon en necesejan kuvon. Informiĝinte pri tio, stevardino Ĉjan tuj refaldis la manikon, enigis la brakon en la kuvon por serĉi la ringon. Ŝi palp-

duonhoron kaj fine trovis la ringon sojfabo grandan. Kiam la s-ino transprenis sian pure lavitan ringon, ŝi ne sciis kion diri pro ekscitiĝo. En la lastaj pli ol tri jaroj, la flughaveno de Pekino ricevis pli ol 12 300 dankesprimajn leterojn de pasaĝeroj ĉinaj kaj alilandaj.

## ENKONDUKO DE ESPERANTO EN CAAC

Mi volas informi al niaj legantoj, ke CAAC aprobas disvastigon de Esperanto kaj volas klopodi por tion realigi. Por bone akcepti kongresanojn de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto, pasintjare respondeculoj de CAAC interkonsiliĝis kun la Ĉina Esperanto-Ligo pri elkulturado de esperantistoj-pilotoj, stevardinoj kaj transportaj laborantoj. Ili intencas funkciigi Esperanto-kurson kun la celo havigi al la kursanoj kapablon konversacii, legi kaj instrui.

Ni anticipe deziras al ili grandan sukceson!

*Afabla stevardino*





*La kunvenejo*

## 20-jara jubileo de la ĉina Esperanta disaŭdigo



*S-ino Ding Jilan salutas la jubileon.*

**E**N la 18-a de decembro 1984 Radio Pekino okazigis te-kunvenon en Pekino por celebri la 20-an datrevenon de sia Esperanta disaŭdigo.

La kunvenon ĉeestis Ĉu Tunan, prezidanto de "Amikoj de Esperanto", Jelezo, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, Ĝang Ĉjiĉeng, ĝenerala sekretario de ĈEL, Ge Baŭĉjŭan, prezidanto de la

Pekina Esperanto-Asocio, kaj aliaj pli ol 150 esperantistoj kaj simpatiantoj el la redakcio de "El Popola Ĉinio", la Ĉina Esperanto-Eldonejo, la Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-komerca Kompanio de Ĉinio kaj ankaŭ ĵurnalismaj organizoj kaj Radio Pekino mem.

Ding Jilan, estrino de Radio Pekino, donis parolon, en kiu ŝi

plene konfirmis la sukcesan laboron de la Esperanta disaŭdigo. Oni aŭdigis surbendigitan parolon de Hujucz, vicprezidanto de la Tutlanda Popola Kongreso kaj prezidanto de ĈEL, kaj legis gratulan leteron el Ŝanhajo skribitan de Bakin, prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio kaj vicprezidanto de ĈEL. Ankaŭ Ĉu Tunan, Ĝang Ĉjiĉeng kaj Ge Baŭĉjŭan faris varmajn parolojn.

Esperanto estas unu el la 43 lingvoj, per kiuj Radio Pekino laboras. Ties Esperanta Sekcio estas la plej malgranda, nur kun ok laborantoj. Tamen ili faris multajn laborojn kaj akiris brilajn sukcesojn. En 1984 ili ricevis tiom da leteroj de aŭskultantoj, ke ilia sekcio okupis la 14-an lokon en Radio Pekino. Ekde 1980 ili elsendas Esperantajn programerojn kvarfoje ĉiutage (antaŭe dufoje ĉiutage). En la komenco ilia voĉo atingis nur Eŭropon kaj nun ankaŭ Latinamerikon kaj nordorientan kaj sudorientan Azion. La kovrita areo de ilia Esperanta elsendo estas la plej granda en la mondo kaj iliaj aŭskultantoj dissemataj en pli ol 50 landoj.



*S-ro Ĉu Tunan (la maldekstra) kaj s-ro Jezeo*



*Esperantistoj de maljuna generacio*

*Funkciulo (staranta) de la Esperanta Sekcio de Radio Pekino kaj gastoj*



*S-ro Sju Sanŝu, respondeculo de la redakcio de EPC, donacas librojn al la Esperanta Sekcio de Radio Pekino.*







*Kantado en Esperanto*

*Gastigantoj montras al kunvenantoj la donacojn de fremdlandaj amikoj.*



*La laborantoj de la Esperanta Sekcio, gvidantoj de Radio Pekino kaj veteranaj esperantistoj*

# 20 JAROJ DE ESPERANTO EN RADIO PEKINO



# Solidaj paŝoj de Esperanto-movado en Ŝandong-provinco

de LIŬ ŜJAŬĜJUN

*Sublima stelo,*

*Vi levas vin sur la ĉielo!*

*Sen bru' aplaŭda,*

*Sen beno laŭta*

*Fariĝu vi progres-modelo!*

Jen strofo de s-ro Li Ŝiĝjun, membro de la Akademio de Esperanto kaj asistanta ĉefredaktoro de "El Popola Ĉinio", dediĉita al la esperantistoj de Ŝandong. Senplende, diligente kaj solide laboras la esperantistoj de Ŝandong. La movado de Ŝandong ne estas elstara kompare kun tiu de aliaj provincoj, kaj la loka ligo ne estas fama en la lando. Tamen, la solida antaŭenmarŝo de E-movado en la provinco estas reala.

E-movado de la provinco komenciĝis en la dudekaj jaroj kaj vigliĝis en la tridekaj. Inter somero kaj aŭtuno de 1933, fondiĝis la Ĉingdaŭ-a E-asocio, kaj tiu funkciigis elementajn E-kursojn en si kaj en Ĉingdaŭ-universitato (la nuna Ŝandong-universitato). Tiutempe en la suplemento "Lumo de Ĉingdaŭ" de "Ĵurnalo de Ĉingdaŭ" aperis fremdlandaj literaturaĵoj tradukitaj el Esp. Pri E-movado okupiĝis s-roj Hŭang Ĝing, Ĝi Hŭanlin, Lju Jiŝeng, Jang Jukun, Ĉiŭ Gŭangŝing k.a., kiuj esperantistigis multajn homojn.

Aparte menciinda estas s-ro Joĉaŝien, unu el la fondintoj de la ĉina E-movado, kiu okupiĝis pri Esp-movado en la provinco kaj donis grandan influon al la E-movado de Ŝandong. Li estis senlaca, solida poresperantisto. Ne parolema, nek diskute-

*En leciono*





*S-ro Joĉaŝien*

*E-kursanoj de Ĝjnan en Daminghu-parko*



ma, li serioze plenumis multajn aferojn ĉu gravajn ĉu bagatelajn, nur se por Esperanto. Li gvidis la laboron de la Ĉina Esperanta Koresponda Lernejo en Ŝanhajo, kompilis instruajn materialojn kaj korektis taskojn de lernantoj. Cetere li okupiĝis ankaŭ pri la distribuado de la esperanta gazeto "La Mondo" kaj pri la laboro de la Ĉina Esperanta Librejo. En 1946, Joĉaŝien venis al la liberigita regiono de Ŝandong kaj laboris en la Ŝinhŭa-librejo. Streĉa laboro detruis lian sanon. Sed malgraŭ sia malsano li diligente laboris plu por Esperanto kaj esperantigis la verkon de Maŭ Zedong "Pri Popol-Demokratia Diktaturo" kaj aliajn. (Pli detala artikolo pri Joĉaŝien aperigita en n-ro 8 de EPC 1982)

Lia sindonemo por Esperanto eĉ hodiaŭ inspiras la junajn esperantistojn.

Depost la Dua Tutlanda Esperanta Labor-kunsido en 1979, pli kaj pli grandiĝis la vicaro de Esperantaj komencantoj. Por pli bone disvastigi Esperanton, Ŝandong-universitato sendis sian junan instruiston al la porinstruista E-kurso establita kune de la Eduka Ministerio kaj la Ĉina Esperanto-Ligo.

Semo de Espero en fekunda kampo certe donas abundajn fruktojn.

Oktobre de 1982, zorgate de koncernaj gvid-instancoj, la unua E-kurso de Ŝandong fondiĝis en Ŝandong-universitato. La instruistoj kompilis kaj mimeografis poresperantan "Verda Stelo Brilas

super Tajŝan". En tiu jaro esperantistoj de Ŝandong unufoje festis Zamenhofan tagon. TV de Ŝandong raportis pri la celebrado, kio vekis grandan intereson de diversrondaj personoj, precipe de junuloj. Multaj junuloj ekvolis lerni la lingvon.


En 1983, ekaperis unu post alia provincanivelaj kursoj, en kiuj lernis pli ol 2 000 ŝtatoficistoj, inĝenieroj, instruistoj, sciencistoj kaj teknikistoj. Multaj el ili fariĝis aktivuloj en E-movado. 46-jara geologia inĝeniero Ŭang Jongĝen esperantistigis multajn junulojn, kiuj jam povas verki literaturajojn kaj profesiajn artikolojn en Esperanto, kaj parto el ili publikiĝis en EPC kaj aliaj esperantaj gazetoj. En malpli ol unu jaro esperantistoj de Ĉingdaŭ, Zibo, Ŭejfang kaj Taj-an starigis 6 kursojn, aranĝis esperantan ekspozicion kaj amuzajn kunvenojn de esperantistoj.

E-movado de Ŝandong estas prizorgata kaj subtenata de la popola registaro. Veteranaj esperantistoj kaj E-simpatuloj aktive helpas la movadon. En aprilo de 1983, ĉe la unua sesio de la Kvina Ŝandong-a Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, la ĉeestantoj varme diskutis pri la disvolviĝo de E-movado kaj unuvoĉe aprobis la "Projekton pri fondo de Ŝandong-a Esperanto-Ligo". Nelonge post tio fondiĝis la prepara komitato por la afero. La fondiĝo de la organizo markis novan etapon de E-movado de la provinco. La plej populara ĵurnalo de la provinco "Daĝong Ĵibaŭ", la Popola Radio-stacio de Ŝandong kaj la

(Daŭrigo sur p. 52)



*La kunsidejo*



*La aŭtoro de "Montara Vilaĝo" parolas en la kunsido.*

## “Montara Vilaĝo” de Chun-chan Yeh eldonita

**L**A romano “Montara Vilaĝo” de Chun-chan Yeh (Cicio Mar), fama ĉina verkisto kaj komitatano de la Universala Esperanto-Asocio, estas eldonita en Esperanto de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, kiel n-ro 21 de la Serio Oriento-Okcidento de UEA.

Por celebri la eldonadon de la verko en Esperanto, la 8-an de januaro 1985 la redakcio de EPC kaj la Ĉina Esperanto-Eldonejo okazigis kunsidon, kiun ĉeestis Chun-chan Yeh. Ĝin ĉeestis ankaŭ Ĵelezo, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, Ĉen Ĵuan, vicprezidanto de la Ĉina Eldonista Asocio, Fan Ĝingji, estro de la Fremdlingva Eldona kaj Distribu Buroo sub la Kultura Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko, Ĝang Ĉjiĉeng, ĝenerala sekretario de ĈEL, Zen Hojaŭ, vicprezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio kaj aliaj pli ol 60 personoj.

En la kunsido Ŝju Ŝanŝu, respondeculo de la redakcio de EPC, konigis la vojon de literatura kreado de Chun-chan Yeh kaj eldonadon de la romano en kaj eksterlande.

“Montara Vilaĝo”, kiu origine estis verkita en la angla lingvo kaj eldonita en 1947, temas pri fora montara vilaĝo de la malnova Ĉinio en la 20-aj jaroj. Ĝi spegulas la vekiĝon kaj ribelon de la ĉinaj laboruloj, kiuj vivis en malsato kaj humileco, kaj ilian sinĵeton al la revolucia torento. Rememorante pri sia verkado de la romano, Chun-chan Yeh diris: “La tiama suferanta Ĉinio forte premis mian koron. Mi ĉekintersiĝis pri literaturo, ĉar mi legis verkojn pri la vivo de kamparanoj de iuj malgrandaj kaj malfortaj nacioj de la mondo. Sed Ĉinio, granda kaj antikva lando, ankoraŭ restis nekonata de la mondo, mi do komencis skribi librojn pri la ĉinaj kamparanoj en fremda lingvo.”

Inter 1933-1936 Chun-chan Yeh verkis novelojn en Esperanto, kiuj estis eldonitaj poste kiel la kolekto “La Forgesitaj Homoj”. Krome, li ankaŭ tradukis nemalmultajn ĉinajn literaturajn verkojn de la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj konigis ilin al alilandaj legantoj,

por ke ili konu la tiaman Ĉinion.

Post kiam “Montara Vilaĝo” estis eldonita unuafoje en Britio en 1947, ĝi estis elektita kiel unu el la plej bonaj literaturaj verkoj, kaj la aŭtoro Chun-chan Yeh, kiel la unua ĉino, kiu verkis romanon en la angla lingvo, havis certagradan influon en Eŭropo. Poste la romano estis eldonita en ĉ. 20 lingvoj en diversaj partoj de la mondo. Novembre de 1982 eldoniĝis “Montara Vilaĝo” en la ĉina lingvo.

La tradukinto de la Esperanta versio de “Montara Vilaĝo” estas mondfama Esperanta poeto William Auld. Li diris en sia letero, ke traduki la valoran romanon estas granda ĝojo, tiom pli ĝuo por li. Humphrey Tonkin, vicprezidanto de UEA, skribis en sia enkonduko por la romano: “Thomas, do, pri verko kies loko estas ĉe vojkruciĝo — inter Oriento kaj Okcidento, inter novo kaj malnovo, inter lingvoj, inter kulturoj. Ni fieras, ke ĝi nun troviĝas en nia Serio.”

# La motoro de la evoluo estas la uzado de la plej granda nombro

---

*Veterana kanada esperantisto s-ro R. Eichholz estas membro de la Akademio de Esperanto kaj direktoro de ĝia Sekcio Teknikaj Vortaroj. Li elspezis dekelkajn jarojn por kompili "Esperanta Bild-vortaro" (Specimeno). Poste li kompilis Sliparan Vortaron kiel ĝian suplementon. En la lastaj jaroj, kunlabore kun sia edzino, li kompilis alian verkon "Esperanto en la Moderna Mondo". En 1983 lia edzino s-ino Vilma Sindona Eichholz vizitis Ĉinion, instruis nian lingvon en Anhuj-provinco kaj kontaktiĝis kun lokaj esperantistoj.*

*Ĉi-sube ni aperigas eltiraĵon el la artikolo de s-ro R. Eichholz.*

— LA RED.

---

**K**UN granda intereso mi legis la artikolon de Ĝu Ŝjueli (Zhu Xueli)\* kaj mi subtenas lian ĝenerale esprimitan konsilon, ke ni kreu novajn terminojn por novaj konceptoj prefere per kunmeto de konataj bazaj radikoj — kiel oni faras tion ankaŭ en la ĉina lingvo — ol per kreado de novaj radikoj. Mi konsentas, ke ni preferu priskribajn terminojn kiel 'fabkazeo' aŭ 'manĝ-bastone-to' anstataŭ la PIV-a termino 'tohuo' aŭ la termino 'haŝio', kiu troviĝas en 'Enciklopedieto Japana'.

Jes, ni povas pli bone kunmeti vortojn en Esperanto ol en multaj aliaj lingvoj, sed ni zorgu, ke la kreitaj vortkompleksoj estu sufiĉe unusencaj. Sed tiun unusencecon ni ne postulu de lernantoj, al kiuj ni instruas mem krei tiuspecajn

vortkunmetojn, se ili ne scias iun precizan terminon. Ili ne mutiĝu, se ili ne povas memori la precizan vorton. Estas pli bone esprimi sin ne precize per priskribaj vortoj kaj vortkunmetoj, ol tute ne paroli.

Por malgrandigi la nombron de la lernotaj vortoj, Esperanto devus havi pli da afiksoj, kiuj klare difinu tiujn ĝeneralajn konceptojn, por kiuj oni ĝis nun ne unuece uzas afiksojn. En PIV vi povas legi, ke -ik estas internacia sufikso uzata por formi, i.a. nomojn de arto aŭ tekniko. Oni povus apliki tiun sufikson al multaj nocioj, al kiuj oni ĝis nun ĝenerale ne aplikas ĝin: inĝenieriko (=inĝenierarto=inĝenierado), elektriko (=elektrosienco: elektrikisto do estus specialisto pri elektrosien-

co; elektristo, kontraŭe estas meitiisto, kiu instalas elektrajn konduktilojn en domoj ktp. — distigon, kiun PIV ne faras), varmiko (=scienco pri varmo). La vorto 'lingvistiko' estas ne nur internacia sed ankaŭ Zamenhofa. Tio tamen ne malhelpas la enkondukon de la pli racia kaj mallonga 'lingviko'. Dependos de la lingvo-aplikantoj, kiujn formojn oni iam ĝenerale uzos. Se pli el ili utilis la skemecajn eblecojn, kiuj eble iom kaŝe troviĝas en nia lingvo, Esperanto povus malgraŭ kreskeginta vorttrezoro fariĝi pli regula kaj pli facile komprenebla por homoj, kies gepatra lingvo ne estas Hind-Eŭropa. Nun ĉinoj amase lernas Esperanton. Se ili insiste pli uzos la skemece kaj ne la naturalisme formitajn termi-

nojn, tio estus la plej efika maniero por rezisti la tro eŭropisman kaj nun ĉefe anglisman evoluon de nia lingvo.

La Prezidanto de nia akademio, d-ro A. Albault, deklaris: 'La motoro de la evoluo estas la uzado de la plej granda nombro' ('Esperanto', novembro 1983). La akademio do ne volas gvidi antaŭiri la evoluon. Ĝi nur volas sekvi ĝin kaj apliki la bremsojn, se iu danĝera misevoluo konstatablas. Estas la tasko de la unuopaj lingvo-praktikantoj, ke ili pripensu la terminojn, kiujn ili uzas, ĉu nova radiko vere estas bezonata, ĉu ne eblus esprimi la koncepton per kunmeto de Esperantaj vortradikoj aŭ afiksoj. Tamen oni estu singardema. Ne ĉiam kunmetita vorto estas preferinda.

S-ro Ĝu ekzemple indikis la eblecon, ke oni anstataŭ la neologismo 'lasero' povus uzi la kunmetitan vorton 'stimul-radio' aŭ — se tiu termino ŝajnas esti tro longa — mallongigi ĝin al SR. Mi volas tuj atentigi, ke tiuspecaj mallongigoj havas la malavantaĝon, ke oni ne certas kiel prononci ilin: ĉu 'sro' ĉu 'soro'? Pli

taŭge estus uzi ne majusklojn, sed krei novan radikon, kiu estas same facile memorebla kiel la mallongigo: 'sro/' aŭ 'soro/'. Ŝajnas al mi, ke granda parto de la homaro pli facile lernus la Esperantan vorton 'lasero' ol 'stimul-radio'.

Jam de multaj jaroj mi laboras pri la kompilado de la Esperanta Bildvortaro, en kiu troviĝas pli ol 20 000 per bildoj klarigeblaj nocioj. Ankaŭ en ĉi tiu vortaro mi preferis terminojn, kiuj konsistis el jam konataj radikoj, se tiuj radikoj (aŭ afiksoj) sufiĉe klare priskribas la nocion. Kiam tio ne eblis, aŭ kiam la terminoj fariĝis tro longaj kaj malfacile manipuleblaj, mi enkondukis malmultajn novajn sufiksojn aŭ regule aplikis aliajn, por ke la kvanto de la lernotaj radikoj ne fariĝu tro granda. Se kunmetita vorto ŝajnis al mi preferinda, mi unualoke menciis ĝin, ekz. 256/22: rul-ŝtuparo (eskalatoro). Por ke la kunmetitaj vortoj estu pli facile ekkoneblaj, mi pli ofte uzis la disigo-streketon, ol oni kutimas fari ĝis nun. Se oni en etnaj lingvoj ne tiom ofte uzas la disigo-streketon, tio ne estu pravigo por ni, ke ni an-

kaŭ en Esperanto ne faru tion. Ni uzu ĉiun eblan rimedon, por ke nia lingvo estu pli facile travidebla, ĉar por antaŭvidebla estonteco, la plej multaj legontoj de nia lingvo estos komencantoj.

La presprovaĵojn de la Esperanta Bildvortaro mi jam antaŭ multaj jaroj sendis al aziaj landoj, por ke aziaj esperantistoj proponu aliajn terminojn, kiuj por ili estus pli facile memoreblaj. Bedaŭrinde mi ne ricevis reagojn el tiu kontinento.

Ekzistas nur unu ebleco rezisti la troan angliĝon de niaj fakaj lingvoj: pli da fakuloj el ne-angla lingvaj landoj devus proponi kaj apliki terminojn devenintajn el aliaj lingvoj. Se tio okazus, ekzistas la ŝanco, ke kelkaj el tiuj terminoj akceptiĝos, ĉar mi certas, ke la nuna situacio ne plaĉas al multaj. Tamen pro nacia orgojlo ni ne forgesu la ĉefan postulon al Internacia Lingvo: Ĝi estu kiel eble plej facile lernebla por la parolantoj de la plej diversaj lingvoj.

\* Ĝi aperis en la kvina numero de EPC, 1984, sub la titolo "Plene Profitigi Produktivecon de Esperanta Vortfarado".

**NOVA GAZETO EN ESPERANTUJO**

**NOVA VOĈO**

**VOĈO DE  
HANDIKAPULOJ**

**Aperas 6-foje en la jaro. Ofsete presata. Grafike moderna aranĝo. Enhave riĉa!**

**Redaktas:  
DUŠAN ADNADJ**

Jen aŭdu nian VOĈON! VOĈO ne lamentas, ĝi: malkovras novan mondon al vi — mondon de handikapuloj, polemikas, proponas, konsilas, helpas, movadumas, recenzas, alproksimiĝas kaj amikiĝas!

Nia VOĈO estas VOĈO por ĉiuj — tio estas ankaŭ via VOĈO Jarabono ne ŝanĝita: 5 US\$, 12.- DM aŭ egalvaloro. Abonu ĉe niaj perantoj aŭ rekte per poŝtenpagilo al adreso: "VOĈO" 56227-Borovo, Školska ul. 25, Jugoslavio.

**Al sama adreso estas bonvenaj viaj kontribuajoj, informoj kaj helpo!**

**ĈINAJ ESP-ISTOJ EN  
MEMORIGO PRI LA 125-A  
DATREVENO DE ZAMEN-  
HOFA NASKIĜ-TAGO**

Okaze de la 125-a datreveno de la naskiĝo de d-ro L.L. Zamenhof, la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Pekina Esperanto-Asocio kune aranĝis memorkunvenon. Ĝin ĉeestis s-ro Ĝang Ĉjiĉeng, ĝenerala sekretario de ĈEL, s-ro Li Ŝiĝjun, membro de la Akademio de Esperanto, d-ro Otto Haszpra, profesoro de la hungara Budapeŝta Teknika Universitato kaj gvidanto de la Scienca Eldona Centro de la Universala Esperanto-Asocio kaj hispana esperantisto s-ro Artur Bastida. Zen Hojaŭ, vicprezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio, prezidis la kunvenon. Ĝang Ĉjiĉeng faris paroladon, en kiu li esperis ke ĉinaj esperantistoj diligente lernos por kiel eble plej rapide altigi sian lingvan nivelon, precipe la fluecon de parolado, por pli bone labori por la Universala Kongreso de Esperanto de 1986 en Pekino. D-ro Otto Haszpra konigis al la ĉeestantoj Esperantan movadon de Eŭropo, Esperantan uzadon en scienca kampo kaj laboron de la Scienca Eldona Centro.

Esperanto-Asocioj de Anhuj, Ŝanŝji, Junnan kaj Ŝandong kaj esperantistoj de la urboj Ŝaŝi kaj Gujlin aranĝis memorigajn aktivadojn. Ili okazigis aŭ raportan kunvenon kaj kunsidon, aŭ prelegajn kaj amuzajn kunvenojn. En la kunvenoj ili varme propagandis Esperanton kaj konigis al la ĉeestantoj la vivon de Zamenhof kaj novan progreson de la ĉina Esperanta movado en 1984.

**LA ASOCIO DE ĈINAJ  
MALJUNAJ ESPERANTISTOJ  
EN PREPARADO**

Laŭ propono de maljunaj esperantistoj de Pekino, Ĝin

Zigŭang, Zen Hojaŭ, Ŝa Di, Ŝju Ŝanŝu, Tang Ŝjun'an, Ivan Ko, Honfan kaj Ĉin Kajĝji iniciatis la fondiĝon de la prepara grupo de Asocio de Ĉinaj Maljunaj Esperantistoj en septembro 1984.

La asocio akceptos tiujn esperantistojn, kiuj lernis Esperanton antaŭ 1955 aŭ havas aĝon de pli ol 50 jaroj. Nun la prepara grupo kaj la Maljunula Universitato sub la Ĉina Maljunula Eduka Asocio kune gvidas tri Esperantajn kursojn, t.e. konversacian kurson por maljunaj esperantistoj, postlecionan Esperanto-kurson por junpioniroj kaj progresigan Esperanto-kurson. En tiuj kursoj senpage lernas ĉ. 200 homoj.

**D-RO OTTO HASZPRA EN  
ĈINIO**

De la 29-a de novembro ĝis la 19-a de decembro d-ro Otto Haszpra, gvidanto de la Budapeŝta Scienca Eldona Centro de la Universala Esperanto-Asocio, profesoro de hidromekaniko de la Budapeŝta Teknika Universitato vizitis Ĉinion laŭ invito, post vizito al Japanio.

En vizito al Ĉinio, li faris fakan prelegon respektive en Nankino kaj Ugong pri hidraŭlika esplorado kaj hidraŭlika modelumado de Hungario, kaj precipe pri filtriĝo kaj fluidelasta vibro. En Pekino li kaj esplorantoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj kunsidis kaj li konigis al ili la sciencajn esploradojn kaj administradon de Hungario. Krom supre menciitaj fakaj aktivadoj, li intervidiĝis kun esperantistoj de tiuj urboj kaj projekciis lumbildojn pri Hungario. Tio profundigis la komprenon kaj amikecon de la ĉina popolo al la hungara popolo. Li ankaŭ ĉeestis la memorkunvenon okazigitan de la pekinaj esperantistoj pri la 125-a datreveno de la naskiĝ-tago de Zamenhof, gastis en la redakcio de El Popola Ĉinio. Li ankaŭ vizitis la historiajn restaĵojn kaj pitoreskejojn en Ŝanhajo, Nankino, Ŝjian kaj Pekino.

En Ĉinio d-ro Otto Haszpra estis akompanata de Li Keŝji, lia koresponda amiko dum pli ol 20 jaroj kaj inĝeniero de la Nordokcidenta Agronomia Instituto.

*D-ro Otto Haszpra*



**ESPERANTISTO DE FR  
GERMANIO EN ĈANGŜA**

La 11-an de decembro 1984 Hermann Behrmann, esperantisto de FR Germanio, estro de Esperanto-Centro de Paderborn iris viziti Ĉangŝa. La 13-an de dec. la Hunan-a Esperanto-Asocio okazigis kunsidon, en kiu H. Behrmann faris paroladon kun titolo "Germana Esperanta Movado" kaj konigis Esperantan

*La foto estis farita de ĵurnalisto de "Keighley News" kaj aperigita en la ĵurnalo la 16-an de novembro 1984.*



movadon de Berlino, Hamburgo, Frankfurto, Paderborn kaj aliaj lokoj.

## LA UNUA ESPERANTO-KONGRESO EN NIĜERIO

De la 1-a ĝis la 8-a de oktobro de 1984, okazis la unua Tutniĝeria Esperanto-Kongreso en la Esperanto-domo ĉe la urbo Illeh Ekpoma apud Gobozburg. Ĉ. 2 000 partoprenintoj faris ĝin la plej granda kongreso de la niĝeria esperantistaro.

Temoj de la Kongreso estis uzado de Esperanto en kulturo, medicino, fiziko, matematiko, geografio, familia agado, domo-konstruado kaj turismo en Niĝerio.

## E-EKSPOZICIO EN BRITIO

Por veki ĉe lokanoj intereson pri la 97-jara lingvo la 15-membra E-grupo de Keighley, Britio, okazigis Esperanto-ekspozicion de la 10-a ĝis la 17-a de novembro 1984 en la enirhalo de la urba biblioteko. Raportisto de la urba ĵurnalo "Keighley News" vizitis la ekspozicion kaj informis en la ĵurnalo pri la ekspozicio.

## MONATO

internacia magazino sendependa

### UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj  
esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140  
B-2000 Antwerpen, Belgio.

## Ni Gratulas

Nia germana s-ano Karl Siegmund, multjara entuziasma abonanto de "El Popola Ĉinio", 80-jariĝis la 10-an de aprilo 1985. Okaze de lia festo ni deziras al li longan vivon kaj kore dankas lin

pro lia afabla subteno al kaj kunlaboro kun ni en la pasinteco.

La foto montras lin (meze), lian fratinnon (maldekstre) kaj la edzinon de lia nederlanda amiko.



## La Ĉina Koresponda Esperanto-Instituto Fondita

**P**OR kulturi esperantistojn kaj akceli la disvolviĝon de la ĉina Esperanto-movado, oni fondis lastatempe en Pekino la Ĉinan Korespondan Esperanto-Instituton, subtenate de la Kultura Ministerio de Ĉinio kaj la Pekina Buroo por Eduko de Plenkreskuloj. Hŭang Naj, fama ĉina esperantisto kaj konsilanto de la Eduka Fonduso de Hŭang Ŝing, funkcias kiel ĝia honora rektoro kaj Li Ŝiĝjun, membro de la Akademio de Esperanto kaj vicĉefredaktoro de la redakcio de «El Popola Ĉinio» kiel ĝia rektoro kaj iuj laborantoj de la redakcio laboras kiel ĝiaj instruistoj.

La instituto sendos al la lernantoj «Esperanto-Kurso por Memlernado», sonbendon, referencajn materialojn kaj sian organon

«Lernilo de Esperanto» kaj stariĝos konsultajn punktojn en urboj kun pli-malpli koncentritaj lernantoj.

La instituto estos monhelpata de la Eduka Fonduso de Hŭang Ŝing, elstara demokratia revoluciisto kaj gvidanto de la Revolucio de 1911. La fonduso estas iniciatita de Hŭang Jigong, nepo de Hŭang Ŝing, laŭ ties instruo: "Por fari konstruadon, oni devas havi kapablulojn; por havi kapablulojn, oni devas disvolvi la edukon aferon." La fonduso premias plej elstarajn lernantojn de la instituto por krei favorajn kondiĉojn por ilia daŭra studo. Ĝi ankaŭ donacos al la instituto porinstruajn instalaĵojn.

La instituto inaŭguriĝis la 1-an de marto 1985.



# Ĝengĝoŭ kun “pendanta” rivero, historiaj restaĵoj kaj famaj temploj

de ŬEJ LJAŬ

Fotoj de ĜOŬ ĈINGJUN

**Ĝ**ENGĜOŬ situas en la mezo de Henan-provinco, sude de la Flava Rivero, oriente de Songŝan-monto. En Ŝang-dinastio antaŭ pli ol 3 500 jaroj, tie jam formiĝis urbo. En 1954, ĝi fariĝis la nova ĉefurbo kaj centro de politiko, ekonomio kaj kulturo de Henan-provinco anstataŭante Kajfeng.

La turisma regiono de la Flava Rivero sin trovas 30 km. nordokcidente de Ĝengĝoŭ. Sin puŝinte tra la lasta gorĝo, la Flava Rivero eniras la ebenaĵon kun granda kvanto da ŝlimo kaj sablo. Pro longtempa sedimentado la riverlito altas je 4-5 m., ie eĉ je pli ol


10 m. super la apudbordaj terenoj, tial la Flava Rivero estas fame konata kiel “pendanta rivero”, kiu mirigas la vizitantojn!

Sur Daju-monto okcidente de la turisma regiono staras la statuo de Daju, heroo de akvomastumado en la antikva Ĉinio. Tiu statuo je 10.7 m. alta estis projektita laŭ la opinioj de enlandaj skulptistoj kaj finkonstruita en 1983. Daju heroe staras kun bambua ĉapelo sur la kapo kaj en simplaj vestoj.

Famaj vidindaĵoj troviĝas koncentre sur la Kvindraka Monto sudoriente de Daju-monto, la centro de la turisma regiono. Tie

estas ankaŭ ideala loko por rigardi desupre la Flavan Riveron. La plej alloga por la vizitantoj estas la 5 metrojn alta statuo de amema patrino, sidanta en la mezo de florbedo, kun bebo en la brakoj. Ĝi estas simbolo de la Flava Rivero, kiu nutras la vastan teron de Ĉinio.

Al la turisma regiono de Ĝengĝoŭ apartenas ankaŭ la urbo Kajfeng kaj la templo Ŝaŭlin. Veturinte de Ĝengĝoŭ ĉ. 60 km. orienten laŭ la Flava Rivero, oni atingas la urbon Kajfeng, unu el la ses antikvaj ĉefurboj de Ĉinio. Tiel frue kiel en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno, Ĝeng-



Stelearoj en la templo Ŝaŭlin

regno (806-375 a.K.) konstruis la urbon tie por plivastigi sian teritorion. Poste, sep regnoj sinsekve prenis ĝin kiel sian ĉefurbon, kaj ĝi estis nomata Dongĝing (Orienta Ĉefurbo).

Dum la dinastio Norda Song en la deka jarcento, Kajfeng estis en sia plena prospereco kaj fariĝis unu el la plej grandaj ĉefurboj en la mondo. Ĝang Zeduan, fama pentristo de tiu dinastio, kreis la pentrorulaĵon "Scenoj apud Rivero en Ĉingming-festo". Tiu pentraĵo priskribas tiamajn scenojn sur ambaŭ bordoj de Bjanherivero sudoriente de la urbo: urbo-pordegaj turoj, multego da oficejoj kaj vendejoj staras dense; viglas komercado kaj trafikado.

En Kajfeng troviĝas multaj famaj historiaj konstruaĵoj kiel Ŝjanggŭo-templo kun impona halo; la alta Drako-pavilono kun belaj duoblaj tegmentorandoj; la eleganta pavilono Juhuang, la antikveca kaj kvieta teraso de Reĝo Ju ktp. Tamen, la plej neforgesebla estas la Fera Pagodo ĉielskrapanta.

La Fera Pagodo en la nordorienta parto de Kajfeng estas konstruita fakte el glazuritaj brikoj kaj tegoloj. Ĝi havas ferajn koloron kaj firmecon, tial oni nomas ĝin Fera Pagodo. La 13-etaĝa pagodo estas alta je 54 m.. Ĉiu el ĝiaj 13 etaĝoj havas pordon, fenestrojn, ĉielen levitan tegmentrandon kaj angulojn, kaj pendantajn sonorilojn, kiuj agrable sonoras en vento. La turo estas ornamita per pli ol 50 specoj de delikataj figuroj kiel flugantaj drakoj, mitobestoj, bodisatvoj, fortuloj, leonoj, floroj ktp.

Turistoj al Ĝengĝou povas viziti ankaŭ la interesan mil-jaran templon Ŝaŭlin 80 km. sudokcidente de la urbo. Tiu templo estis konstruita en 495 p.K. En 527 p.K., hinda eminenta bonzo Bod-

hidharmo fondis tie Ĉan-sekton (dhyana) de budhismo. En la plej prospera periodo la templo Ŝaŭlin posedis pli ol 14 000 muojn da kampoj (15 muoj=1 hektaro), domojn kun pli ol 5 000 ĉambroj kun areo de 360 000 kvadrataj metroj kaj pli ol 1 000 budhistoj. Nun en la korto de la templo ankoraŭ staras la bone konservitaj Mil-budha Halo kaj aliaj konstruaĵoj.

En la Mil-budha Halo troviĝas fama kolora fresko "500 Arhatoj al Budho Vairokano" de Mingdinastio (1368 — 1644 p.K.). La fresko kun 320 kvadrataj metroj dividiĝas en tri partojn: supre staras montoj unuj apud aliaj, meze ŝvebas nubaro kaj malsupre ruliĝas ondoj. En ĉiu parto troviĝas nombro da homoj, iuj luktantaj kontraŭ tigroj kaj drakoj, aliaj recitantaj sutron kun urno en la manoj, kaj la triaj vigle diskutantaj. Sur la brika planko de la halo estas 48 kavetoj je ĉ. 20 cm. profundaj, kiujn estigis la piedoj de budhistoj dum luktarta ekzerco. Laŭdire, tiu ekzercado komenciĝis de Bodhidharmo por forigi dormemon kaj lacecon kaŭzitan de longa sidado. Poste la budhistoj perfektigis la luktarton iom post iom kaj fine kreis pli ol 100 seriojn de tiu gimnastiko, tiel ke formiĝis fama "Ŝaŭlin-luktarto".

Nordokcidente je unu km. de la templo Ŝaŭlin troviĝas la kaverna Templo de Bodhidharmo, en kiu staras roko kun homfiguro. Laŭdire, Bodhidharmo sidadis tie kun kruroj krucitaj vizaĝe al la roko dum naŭ jaroj kaj lia figuro eniris en la rokon.

Okcidente de la templo Ŝaŭlin staras la fama pagodaro el pli ol 250 pagodoj, en kiu estis entombigitaj abatoj. La pagodoj estas en diversaj kaj artismaj formoj. Laŭdire, oni konstruis ilin laŭ la

rango kaj erudicieco de tiuj forpasintaj budhistoj en budhismo.

Proksime de la templo Ŝaŭlin troviĝas ankaŭ la famaj temploj Ĝongjue kaj Songjue, instituto Songjang, observatorio ktp. Ankaŭ ili estas interesaj kaj vizitindaj por turistoj.

En Ĝengĝou kaj Kajfeng oni povas aĉeti diversajn artaĵojn kiel jadaĵoj, brodaĵoj, kaligrafiaĵoj, pentraĵoj, skribiloj, ktp. La jadaĵoj de Henan estas famaj en kaj eksterlande, pro siaj bonkvaliteco, delikateco kaj diverseco, ekzemple, delikata kaj travidebla incensujo, eleganta smeralda rozario, varikolora kaj forta leono ktp.

La brodarto de Kajfeng, komencita en la dinastio Norda Song, jam havas historion de pli ol 800 jaroj. Prenante famajn ĉinstilajn pentraĵojn kiel modelojn, oni faras duflankajn brodaĵojn kun malsamaj koloroj kaj bildoj per dekoj da stebomanieroj. Tiaj brodaĵoj versimilas al la originalaj pentraĵoj.

En Ĝengĝou oni povas ĝui famajn pladojn kiel tiu de karmo de la Flava Rivero kun vermiĉeloj, bongusta ovo kuirita en fera kaserolo, hidno kun ovoblanko ktp. El ili la plej fama estas tiu de karmo de la Flava Rivero kun vermiĉeloj. Kiam la karmo de la Flava Rivero estis kuirita de eminenta kuiristo, ĝi fariĝis jujubruĝa, delikata kaj bongusta, kun oranĝkoloraj vermiĉeloj maldikaj kiel haroj.

En Ĝengĝou, servas al eksterlandaj vizitantoj la Internacia Hotelo kaj Ĝengĝou-hotelo, sume kun pli ol 1 000 litoj. Krome, la Centro de la Henan-a Internacia Turisma Servo kune fondita de Hongkong-a kaj Henan-provinca entreprenoj estos moderne ekipita kaj malfermiĝos ĉi-somere.




*Strato de Ĝengĝoŭ*



*La memoriga pagodo Erĉji*



*Pagodaro okcidente de la templo Saŭlin*





*Cin-stila câmbro de Gongôu-hotelo*





*Salikokoj spicitaj per fruktosuko*

*Ĉe la Flava Rivero*

*Foiro antaŭ Ĝongjüe-templo*






*Ĝūoga*

# Tragedio de Ĵaba-oj

de LAN ŠAN

Fotoj de LAŬ BAJ



*Ŭangĉin kaptas  
Ĝūoga en foirejo.*

*Ĵaba-a trupo ekdancas por ŝirmi Ĝūoga.*





“ĴABA-OJ migradas en tutjaro, vivante mizere en homaro.” Jen trista tibeta popolkanto rememorigas pri la malproksimaj mizeraj jaroj. La granda dancdramo “Ĵaba-a Amo” ekkaptis la koron de la rigardantoj tuj ĉe sia komenco. Ĝi estis prezentita de la Tibeta Ensemblo maje en Pekino.

“Ĵaba-o” signifas migrajn artistojn, kiuj vivis de prezentado sur strato en orienta Tibeto en la malnova socio. Tiam la ĵaba-oj estis malriĉaj kamparanoj vivintaj en la Tibeta fundo. Por sin vivteni, ili organizis ĵaba-an trupon el samaj familianoj kaj parencoj, migradis kiel ciganoj, vivis de stratprezentado kaj suferis grandan mizeron. Ili estis lertaj prezenti tamburinan dancon kaj polajn kantojn kaj dancojn.

La dancdramo “Ĵaba-a Amo” ĉerpis materialon el migra vivo de ĵaba-oj kaj havas simplan intrigon kiel jene:

En la tempo de foiro, kiu okazis unufoje en jaro, aristokrato

Ŭangĉin kun siaj subuloj venis por kapti la fuĝintan servutulon Deĝji kaj lian filinon Ĝuoga. Ĝuste en tiu momento ĵaba-a trupo atingis la foirejon, la artistoj tuj elpensis kontraŭrimedon. Ili gaje ekdancis tamburinan dancon. La knabinoj turniĝante frapis tamburinojn, dum la knaboj faris transkapiĝojn, svingante tintiletojn. Ŭangĉin kaj liaj sekvantoj konfuziĝis. Profitante la okazon, Ĝuoga fuĝis en arbaron, helpate de la gvidanto de la trupo Ĝanduj.

Pro la sama sorto li ekamis la belan kaj bonkoran Ĝuoga, kaj ŝi unufoje dronis en senlima feliĉo. La ĵaba-a trupo gratulis ilin pro ilia interfianĉiĝo kaj gaje ekdancis.

Sed neatendite venis alia malfeliĉo. La intendanto de Ŭangĉin kun siaj helpantoj persekutis ilin en la arbaron kaj forrabis Ĝuoga. Ili mortigis ŝian patrinon. La liberama Ĝuoga pie preĝis al Dio, ke li benu ilin. Tamen tio ne ŝanĝis ilian sorton.

En la Novjara Tago laŭ la tibeta kalendaro la ĵaba-a trupo venis al la bieno de Ŭangĉin por fari prezentadon kaj elaĉeti Ĝuoga kontraŭ juveloj. La malica Ŭangĉin kaj lia intendanto intencis mortigi Ĝanduj per venena vino. La intrigon rimarkis Ĝuoga. Kun kor-doloro kaj malamo ŝi forkaptis la vinon kaj eltrinkis ĝin. Per tio ŝi dediĉis sian ardan amon al Ĝanduj kaj esprimis proteston kontraŭ la maljusta socio.

La tragedio “Ĵaba-a Amo” ree prezentas la kruelecon de servuta sistemo kaj la mizeran vivon de servutuloj, instruas ami la hodiaŭan feliĉan vivon kaj kuraĝigas la junulojn por feliĉo. Ĝiaj dancoj, muziko kaj belarta aranĝo karakteriziĝas per forta tibeta gusto. El ĝi la rigardantoj vidas la stilon de ĉefaj tibetaj dancoj kaj diversajn ĉarmajn kostumojn de tibetanoj.

La tibeta nacieco havas originalan antikvan kulturan tradicion kaj estas lerta en kantado kaj dancado. Kaj Tibeto estas laŭda-




*Ĝŭoga vidis sian amaton en iluzio.*

ta kiel “maro de kantoj kaj dancoj”. Estas la unuafoja provado por tibetaj artistoj krei tiel grandan danĉdramon kaj esprimi la profundan temon de la aktuala

vivo per nacieca muziko kaj dancoj. Por tio la koreografoj kaj junaj aktoroj de la Tibeta Ensemblo elspezis pli ol unu jaron, dum kiu ili loĝis kun tibetaj paŝtistoj por

sperti la vivon kaj kolekti materialon. Ili faris kuraĝan provon en verkado kaj fine sukcesis prezenti al la rigardantoj floron de tibeta arto.

*Ĝŭoga eltrinkis la venenan vinon, per kiu Ŭangĉin intencis mortigi Ganduj.*





## Lulilo de Ĉinaj Marnavigistoj

**E**N la printempo de 1983 Hŭang Kang, estro de la ĉina oceana ŝipo Ĝinping, estis vokita al la marafera tribunalo de la supera juĝejo de Britio pro tio, ke lia ŝipo koliziis kun panama dragŝipo. Post 7-tagaj streĉaj pridemando kaj sindefendo li finfine akiris sukceson kaj estis laŭdata de la juĝistoj kiel "saĝa kaj kompetenta ŝipestro". Tiu ŝipestro diplomitiĝis el la Ĝjimej-a Marnaviga Kolegio en 1954.

En la haveno Bahama de Usono iu magnato de ŝipoj en Hongkong aĉetis luksan poŝtan ŝipon kun ŝarĝkapablo de pli ol 80 000 tunoj. Tiu ŝipo, ne riparita kaj ne uzata dum multaj jaroj, sukcese traveturis Pacifikon kaj sekure atingis Hongkong. Ĝin gvidis Ŝjŭan Ŭej. Per siaj eksterordinaraj kuraĝo kaj talento li glate plenumis la navigacian taskon kaj estis titolita honora membro de la Reĝa Marnaviga Asocio de Britio.

Tiu ŝipestro estis diplomito de la Ĝjimej-a Marnaviga Kolegio en 1936.

Hodiaŭ la diplomitoj de la nomita kolegio, kiel Hŭang Kang kaj Ŝjŭan Ŭej, laboras sur naviglinioj inter 5 kontinentoj. De 1920, kiam la fama patriota elmigrinta ĉino Ĉen Ĝjageng fondis la Ĝjimej-an Marnavigan Kolegion, ĝi elkulturis pli ol 5 000 marnavigajn teknikistojn, el kiuj 418 fariĝis ŝipestroj, 133 — ĉefmaatoj kaj pli ol 400 — maatoj kaj ĉefmaristoj. La unua estro de la unua ĉina oceana varŝipo Ĉangĝeng kun kapacito de pli ol 7 700 toneloj, la unua estro de la ĉina altklasa pasaĝera ŝipo Jaŭhŭa veturinta la unua al Japanio, la estro de la plej aĝa ĉina oleŝipo kun kapacito de 100 000 toneloj kaj la unua estro de la plej granda ĉina oceana trenŝipo, ĉiuj estas diplomitoj de la nomita kolegio. Pro siaj lerteco kaj diligenteco kaj

bona kunlaboro kun aliaj, ili ĝuas tre altan prestiĝon inter la marnavigistoj en kaj eksterlandaj. Oni senopone opinias, ke la Ĝjimej-a Marnaviga Kolegio estas lulilo de ĉinaj marnavigistoj.

Sur la placo meze de la kolegio staras masto alta je dekelkaj metroj, kun ŝtupetoj ĝis la supro. Ĝi estas timinda en aspekto, sed ĉiu unuaklasa lernanto devas lerte grimpi, alie li ne povas trapasi ekzamenon pri marista tekniko.

En laboratorio estas modelo de aŭtomata ŝtirejo. Sub la gvido de la estonta "ŝipestro" la "maristo" lerte kaj senerare direktas "ŝipon", laŭ la difinita "akvovojo", por ke ĝi sekure atingu la cellokon. Por kombini teorion kun praktiko, la lernantoj devas travivi pli ol duonjaron en laboratorio, praktika ŝipo kaj marŝipo.

La tasko de la kolegio estas kulturi kompetentajn fakulojn laŭ bezono de la marnaviga afero.



Praktikaj ŝipoj de la kolegio

En la frua periodo post la fondiĝo de la kolegio, sinjoro Ĉen Ĝjageng jam aĉetis eksterlande ŝipmotoron kaj avangardan fiŝkaptan trenŝipon por havigi al la lernantoj kapablojn de stirado, riparado k. a.

Nun en la kolegio troviĝas, krom 3 praktikaj ŝipoj, ankaŭ pli ol 20 laboratorioj kaj surakvaj trejnaj stacioj. La lernantoj devas lerni ne nur maristajn kaj maŝinistajn laborojn, ekz. tornado, stablolarbo, frezado, rabotado, veldado, senrustigado kaj lakado, sed ankaŭ laborojn farenadajn por altnivela ŝipano, ekz. difino de naviglinio, fikso de ŝipozicio, de- kaj albordigo de ŝipo. Krome, ili devas lerni ankaŭ sciojn kaj teknikojn de fajroestingado, breĉoŝtopado kaj savado, tiel ke ili povas fari riparadon kaj forigi la danĝeron, kiam akcidento okazas. La teknikisto, ŝipestro, ĉefmaato, maato, ĉefmaristo kaj ĉefmaŝinisto devas posedi kapa-



*Prelego pri naviga historio*

blon agi kontraŭ ĉia situacio. En kriza momento, kiel komandanto la ŝipestro devas en plej mallonga tempo organizi ĉiujn ŝipanojn en fortan batalan grupon. Samtempe li ankaŭ kiel ĉiopova ŝraŭbo ĉiam fiksiĝas en necesa loko.

Pro la speciala bezono de marnavigacio la maristoj, precipe la ŝipestro, devas bone koni la di-

versajn internaciajn marnavigajn leĝojn, kuraĝe defendi la dignon de la patrolando kaj posedi almenaŭ unu fremdan lingvon. Por fremdlingva instruado oni ekipis la kolegion per modernaj elektraj instalaĵoj.

La kolegio ankaŭ ne ŝparis penon, por ke la lernantoj estu amikaj inter si, diligentaj en laboro kaj modestaj en vivo. Kaj la harmonia kunlaboro de ĝiaj diplomitoj kun aliaj estis laŭdata de marnavigistoj de multaj landoj. En trejnado la kolegio emfazas, ke la lernantoj "fariĝu kvalifikitaj ŝipanoj kaj povu mem fari ĉiajn malfacilajn laborojn", ekzemple en trejnado 6 lernantoj en unu ŝipeto devas remi samtempe kun difinita rapideco kaj je difinitaj fojoj en unu minuto. Post unusemajna trejnado aperis vezikoj sur la manplatoj kaj postaĵo de iuj novaj lernantoj, tamen ĉi tiuj pli fortigis kaj pli spertigis. Por ke la lernantoj konu la maron kaj levu la kuraĝon kaj kapablon agi kontraŭ ĉia situacio, la kolegio ĉiujare okazigas naĝon trans la Gaŭĉji-Ĝjimej-an Markolon. Ne estas mirinde, ke Hongkong iam enoficigis senekzamene maristojn kaj superajn ŝipanojn diplomitajn el la Ĝjimej-a Marnaviga Kolegio.

*Leciono sur ŝipo*



# Sincera koro, fonto de entuziasmo

de LI PING

**ĈAŬJANG-DISTRIKTO** en la orienta parto de Pekino estas la plej dense loĝata en la urbo. En tiu ĉi distrikto aperis unu post alia modernaj apartamentaj domblokoj, kien transloĝiĝis nemalmultaj artistoj, tiel la loko fariĝis iom post iom centro de artistoj.

Iuj maljunaj artistoj retiriĝis pro sia granda aĝo el artistika aktivado kaj restas hejme por skribi rememoraĵojn, sed ili ne volantas vivi nur tiele. Iuj artistoj mezaĝaj kun granda energio ne nur prizorgas sian propran laboron, sed ankaŭ volas fari ion utilan por la socio. Vidante, ke iuj junuloj post laboro vagas sur stratoj aŭ ludas kartojn por pasigi tempon, aliaj havas fortan deziron lerni, sed ne povas trovi instruistojn, la artistoj skribis al koncerna fako esprimante deziron servi al la socio kaj al junuloj. Subtenate de la urba kaj distrikta registaroj, la Ĉaŭjang-a Kultura kaj Arta Konsultiga Centro fondiĝis komence de la printempo de 1983.

La instruistoj de la centro donas lecionojn senpage. 47 artistoj de la distrikto memvole laboras kiel artaj direktantoj. Dum la pasintaj du jaroj, ili okazigis kelkdek kursojn pri fakaj temoj, kiuj altiris milojn da aŭskultantoj. Inter ĉi tiuj la plej juna havas nur 11 jarojn, dum la plej maljuna 78. Ili plejparte venas el proksimaj lernejoj, fabrikoj, kamparo kaj servaj profesioj.

La kursoj koncernas diversaspecajn temojn, ekz. "Kiel verku junaj literaturaj amatoroj", "Tekniko de akvarelo", "Maniero de voĉa sonigado en voĉa muziko", "Kiel deklami", "Tom pri la ĉina klasika kaj folkloro muzikoj", "Prezenta arto de Pekino-opero" kaj "Sperto pri karikaturo".

Antaŭ sia prelego fama tenorulo Loŭ Ĉjanguj kunsidis kun amatoraj kantistoj de Ĉaŭjang-distrikto por akiri bonan efikon de la kurso de voĉa muziko, poste li donis lecionojn paŝon post paŝo laŭ ilia deziro. Kvankam li aĝas pli ol 60 jarojn kaj fartas nebone, li ĉiufoje biciklis al la kurso, kio multe kortuŝis la kursanojn. Juna laboristino U Ŝjaŭli estas amatorino de voĉa muziko, kaj ĉagreniĝis, ke ŝi ne povis trovi instruiston. Aŭskultinte kelkfoje la prelegojn faritajn de Loŭ Ĉjanguj, ŝi emocie diris: "Antaŭe mi sciis nur ke li estas fama kantisto, kaj neniam revis, ke mi povos aŭskulti lian lecionon. Liaj lecionoj estas viglaj kaj praktikaj, ni bone komprenis kaj multe rikoltis."

Fama Pingĝju-opera aktorino Ŝin Fengŝja montris grandan fervoron al kursoj malgraŭ sia paraliziĝo. Ŝia filo alportis ŝin surdorse al la kursejo. Vidante ŝin enportata, multaj kursanoj larmis, kaj manklakado longe daŭris en la halo. Por pli grandigi la efikon de la lecionoj, ŝi alkondukis siajn kvar disĉiplojn. Ili kantis por la kursanoj

*Drama aktoro Ĉju Ŝjŭanhe lekcias pri deklamado.*





*Ekspozicio de pentraĵoj aranĝita de la konsultiĝa centro*

fragmentojn el Pingĝju-operaj teatroj, kio estis tre bonvena.

Je Ŝengĉang, fama aktoro de Pekin-opero, parolis en simpla maniero pri artaj karakterizaĵoj de Pekino-opero, tio profunde impresis la aŭskultantojn precipe la junulojn. Studento de la Pekino Radio-disaŭdiga Instituto diris al mi: “Antaŭe mi ŝatis nur fremdlandajn muzikojn, kaj sciis nenion pri Pekino-opero. Tiu fenomeno estas tre populara ĉe la junuloj de nia generacio. Post vizito al la kurso, mi kaj miaj kamaradoj perceptis la pompecon de nia nacia arto. Por ni, estontaj reĝisoroj, ignori Pekin-operon estas granda manko, kaj ni devas studi ankaŭ la arton de nia nacio.”

Maljuna verkisto Ŝjaŭ Ĝjun estas amiko de Lusin. Li aĝas jam 80 jarojn. Apenaŭ aperis la afiŝo por lia kurso, junaj amatoroj de literaturo informis unu alian. Iuj venis de kamparo malproksima je dekkelkaj kilometroj. La atmosfero de la leciono estis tre vigla. Junuloj prezentis

al li multajn slipoj kun demandoj, kaj tiu respondis pacience.

En la printempo de 1984, okazis en Pekino solo-konkurso de junaj amatoraj kantistoj. La Ĉaŭjang-a Kultura kaj Arta Konsultiĝa Centro partoprenis en la elektado de la konkurso. La centro invitis famajn kantistojn Ĝang Ĉjŭan, Liŭ Janping kaj Loŭ Ĉjanguj por fari juĝon pri la 47 konkursoj de Ĉaŭjang-distrikto, 10 el tiuj estis rekomenditaj al la finala konkurso de la tuta urbo. Antaŭvespere de la finala konkurso, Ĝang Ĉjŭan donis lecionon pri “Psikologio antaŭ kanta konkurso”. Loŭ Ĉjanguj prezentis konkretajn proponojn al ĉiu kantisto kaj montris atentindajn problemojn. Ĉiuj 10 kantistoj trapasis trirondajn konkursojn de la urbo kaj gajnis premion.

En tiu ĉi konkurso, kamparanino Liŭ Ŝiŭĉing, kursano de la centro, estis multe aplaŭdata de spektatoroj kaj fakuloj pro sia dolĉa voĉo kaj gaj-



*Prezentado*

nis duan premion. Tuj poste ŝi estis akceptita de la Centra Ensemblo kaj enviciĝis inter la profesiaj kantistoj. 23-jara serena Liŭ Ŝiŭĉing ŝatis muzikon de sia infaneco. Por bone kanti, ŝi aĉetis akordionon kaj ofte iris al urbo por lerni kanti. Post la fondiĝo de la centro ŝi neniun fojon preterlasis la lecionojn. La instruistoj pacience korektis ŝiajn mankojn en ŝia voĉa sonigado kaj disvolvis ŝian superecon. Ŝi finfine sukcesis.

En la varma manklakado, rideto aperis sur la vizaĝo de la instruistoj. Sed ili sin kaŝis de mikrofonoj kaj fotiloj de ĵurnalistoj, nerimarkite forlasis la teatron kaj iris hejmen laca.

Ŭang Feng, sekretario de la centro, diris: "Mi ofte pensas, de kie venas la senvelka entuziasmo de tiuj artistoj jam ĝuantaj vastan renomon. Kaj la respondo nur povas esti: la entuziasmo fontas el ilia plena sincereco al la arto kaj la publiko."

## POR VIA SANO

### Masaĝo por forigi sendormecon

Sendormeco facile deprimas sian suferanton kaj eĉ difektas lian sanon, tial oni devas kuraci ĝin ĉiamaniere.

Sendormeco estiĝas de multaj kaŭzoj. Ĉi tie ni konigos du efikajn kuracmetodojn kontraŭ sendormeco kaŭzita de neŭrastenio.


I. Preni sidan teniĝon kaj per unu fingro kelkdekfoje premi la akupunkturajn punktojn *sanjinĝjaŭ* de ambaŭ kruroj (10 cm. supre de la interna maleolo kaj ĉe la malantaŭa rando de la interna flanko de la tibio). La ĝusta loko estas tie, kie sentiĝas doloreto kaj ŝveliĝo (bildo 1). Post tio kuŝi dorse kaj alterne premi permane la akupunkturajn punktojn *ŝenmen* de ambaŭ manoj (ĉe la ulna fino

de la etfingro kaj ĉe la kavo de la pojna sulketo) tiom longe, ĝis kiam la suferanto sentas doloretan kaj ŝveliĝon (bildo 2). Kaj poste kuŝi ventre, meti la pugnitajn manojn unu super la alia inter la akupunkturajn punktojn *ŝang'ŭan* (bildo 3, 16 cm. supre de la umbiliko) kaj *ĝong'ŭan* (bildo 3, 13 cm. supre de la umbiliko). Lasu la korpon nature premi la pugnoj 2-3 minutojn, kaj tiam la suferanto devas koncentri sian atenton sur la prematan lokon, kuŝi sur la maldekstra flanko de la korpo kaj fari profundan spiron kelkfoje (la profunda spiro devas esti delikata, milda, longa, natura, tamen ne barata). Post tio la suferanto devas kuŝi sur la dekstra flanko de la korpo, fari

saman profundan spiradon, repreni naturan kuŝan teniĝon kaj spiri nature. Tial baldaŭ la suferanto endormiĝos.

II. Alterne premi la akupunkturajn punktojn *ŝenmen* de ambaŭ manoj kelkdek fojojn, kuŝi en teniĝo plej komforta, meti malmolan kaj elstaran parton de pugnitaj manoj sur lokon inter la brovoj, koncentri la penson sur la prematan lokon kaj atente aŭskulti la spiradon. Baldaŭ la suferanto endormiĝos.

La supre diritaj metodoj nur helpas endormiĝi, kaj krome duonhoron antaŭ la enlitiĝo la suferanto devas malstreĉi la menson, ne cerbumi, des pli ne pensi pri malagrablajo.





Prof. Ni Gengju

NUNAJ ĈINOJ

# Ĉina juĝisto de la Internacia Kortumo de Justico

— PRI INTERVJUO AL PROFESORO NI ĜENGJU  
de ĜAN ŜJANG

**P**ROFESORO Ni Ĝengju, jura konsilanto de la Ministerio pri Eksteraj Aferoj de Ĉinio kaj membro de la Komitato de la Internacia Juro de UNO, estis elektita kiel juĝisto de la Internacia Kortumo de Justico, kun aprobo de la granda plimulto, ĉe la Ĝenerala Asembleo kaj Sekureca Konsilio de UNO en la 7-a de novembro 1984. Li estas la unua ĉina juĝisto de la Internacia Kortumo de Justico 35 jarojn post la fondiĝo de la nova Ĉinio.

Mi intervjuis lin, kiu gajnis honoron por la ĉina juristaro, en lia apartamento en Dongĝjaŭminŝjang-strato, Pekino. Li kondukas milde kaj ĝentile kaj aspektas erudicia. Liaj arĝentaj haroj vidigas, ke li multe travivis. Kaj tamen li estas tiel vivplena, ke oni eĉ ne povas kredi ke li estas jam 78-jara.

Profesoro Ni respondis demandojn al mi koncize. Unue li raportis al mi pri la funkcioj de la Internacia Kortumo de Justico kaj la elektado de juĝistoj.

La Internacia Kortumo de Justico de UNO fondiĝis en 1946 kaj konsistas el 15 juĝistoj el diversaj landoj. Tiuj, kiuj gajnas aprobon de la granda plimulto respektive ĉe la Ĝenerala Asembleo kaj Sekureca Konsilio de UNO, povas esti elektitaj kiel juĝistoj de

la kortumo. Ĉiu juĝisto servas por naŭ jaroj kaj havas rajton esti reelektita. En ĉiu tria jaro triono de la juĝistoj devas esti reelektita. Nun kvin juĝistoj finis sian servon en la 5-a de februaro 1985. La azia regiono devis elekti du juĝistojn. Por tio kandidatis juĝistoj el Ĉinio, Japanio, Tajlando, Sirio, Bangladeŝo, Libano, Sri-lanko kaj Izraelio. Rezulte, ĉina kaj japana juĝistoj estas elektitaj, kaj la aliaj tri elektitoj estas el Norvegio, Pollando kaj Niĝerio. La Internacia Kortumo de Justico traktas interŝtatajn procesojn kaj faras konsultiĝojn pri juraj problemoj laŭ petoj de la organizoj de UNO.

Pri la ĉifoja balotado, profesoro Ni humore komencis: “Laŭ mi, esti ene estas pli preferinde ol esti ekstere, ĉar nur tiel ĉina juĝisto povas pli bone ludi sian rolon. Antaŭe la ĉinaj juĝistoj ne kandidatis pro nematuraj kondiĉoj.” Li diris, ke antaŭ li la ĉinaj juĝistoj Ŝju Mo kaj Gu Ŭejĝjun laboris kiel tiuj de la Internacia Kortumo de Justico. Sed mankis en ĝi ĉina juĝisto dum la pasinta sufiĉe longa tempo. Multaj fremdlandaj amikoj foje refoje diris, ke estas neimageble, ke en la Internacia Kortumo de Justico mankas juĝisto el Ĉinio, kies loĝantaro konsistigas kvaronon de tiu de la mondo. Kiam profesoro

Ni faris lecion en du fremdlandaj universitatoj antaŭ du jaroj, iuj aŭskultantoj demandis, kiam ĉina juĝisto laboros en la Internacia Kortumo de Justico.

Profesoro Ni daŭrigis: “Estas grandega honoro por mi fariĝi juĝisto de la kortumo. Mi bone scias, ke mi ŝuldas mian sukceson en kandidatado al la ĝustaj internaj kaj eksteraj politikoj, kiuj estas praktikataj de Ĉinio kaj forte subtenataj de la popolo de la lastaj jaroj, kaj ankaŭ al la ĉiam pli altiĝanta prestiĝo de la lando. Kiel granda lando en la mondo, Ĉinio ludas pli kaj pli gravan rolon ne nur en politiko kaj ekonomio, sed ankaŭ en jurisprudenco.”

Profesoro Ni kun emocio rememoris la pasintaĵon antaŭ sesdek jaroj.

Tiam li venis al Ŝanhajo por viziti lernejon. Li aŭdis, ke eksterlanda juĝisto humiligis ĉinan juĝiston en ŝanhaja juĝejo, pro kio strikis civitanoj. Poste li persone iris al la juĝejo de koncesiita kvartalo por rigardi kuan traktadon pri proceso. Antaŭ tiu ĉi junulo aperis jena sceno: En la tribunalo la fremdlandaj juĝistoj kondukas arogente, dum la ĉinaj juĝistoj ludas la rolon nur de iliaj akompanantoj. Li vidis ankaŭ, kiel multe tiranataj estas ĉinoj en

iuuj specialaj konsulaj juĝejoj. Lin ĉagrenis tio, kiam Ĉinio povos restarigi sian justican dignon. Ekde tiam, juna Ni ekhavis la volon esti juĝisto, kiam li plenkreskiĝos. Poste li trapasis la eniran ekzamenon de la jura kolegio de la Dong'u-a Universitato.

Post la diplomiĝo li daŭrigis sian studon eksterlande. En Usono li gajnis doktorecon pri juro en la Jura Kolegio de la Stanforda Universitato kaj la titolon de honora esploristo en la Jura Kolegio de Universitato Johns Hopkins. Reveninte al la patrolando, li servis kiel advokato kaj instruis en kelkaj universitatoj. Post la Dua Mondmilito li servis kiel membro de la internacia procesa sekcio de la Internacia Milita Tribunalo por la Ekstrema Oriento. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, li instruis sep jarojn en universitato, poste li servis kiel arbitracianto por la Ĉina Mar-komerca Arbitracia Komisiono kaj la Ĉina Eksterlanda Ekonomia kaj Komerca Arbitracia Komisiono, kiel konsilanto de la Ĉina Mara Asocio kaj Ĉina Asocio de Internacia Juro kaj membro de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. Li multfoje ĉeestis internaciajn konferencojn kiel jura konsilanto de la ĉina registara delegacio. En 1981 li estis elektita kiel membro de la Komitato de la Internacia Juro de UNO. Li montris altan talenton en kompilado kaj disvolvado de la internacia juro.

Dum pli ol duono da jarcento li sin dediĉis al jurisprudenco kaj faris sian kontribuon por riĉigi jurispudencan trezoron. Liaj verkoj inkluzivas «La Juraj Sistemoj en Usono kaj Britio», «La Problemo pri Jura Jurisdikcio en Internacia Leĝo», «Teorio kaj Praktiko Koncerne Jurisdikian Imunecon de Ŝtatoj» k. a. Krome

*Membro de la Komitato de la Internacia Juro gratulas prof. Ni Ĝengju, ke ĉi tiu fariĝis juĝisto de la Internacia Kortumo de Justico.*



li tradukis ankaŭ multe da gravaj verkoj pri internacia juro. Li estas laŭdata de la ĉinaj kaj eksterlandaj juĝistoj pro siaj riĉa sperto, nobleco kaj devokonscio al sia profesio.

Profesoro Ni diris: “Kiel reprezentanto de la ĉina civilizacio kaj la ĉina jurista rondo en la Internacia Kortumo de Justico, mi kuraĝigos min fari kontribuon por paco solvi internaciajn malakordojn laŭ internacia juro, grandigi aktivajn rolojn de la Internacia Kortumo de Justico kaj defendi la mondpacon.” Li baldaŭ flugos al sia nova posteno en Hago, la sidejo de la internacia kortumo.

Li, kiel grandaĝulo, oficiojaĝos trans oceanoj, kio nature vekis ĉe mi zorgon pri lia sano.

Sed profesoro Ni humore aldonis: “Kvankam mi baldaŭ aĝos 79 jarojn, tamen mi sentas min bone kaj havas ankoraŭ energion por labori. Mi faras preparan laboron kaj en fiziko kaj en menso por akomodigi al la intensa laboro.” Li diris al mi, ke li grim-

pas sur la monton en la okcidenta parto de Pekino unu fojon semajne, tion li faras de 20 jaroj. Krome, li ankoraŭ ascendas ŝtuparon de 14-etaĝa domo ĉiutage por ekzerci la korpon. Kiam li havas sufiĉe bonan humoron, li spektas lokan teatraĵon. Estas ne senkaŭze, ke profesoro Ni iras ĉiam kun rekta talio kaj per firmaj paŝoj kaj havas viglan menson.

En la 30-a de novembro 1984, Ĝaŭ Zijang, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, en sia letero varme gratulis profesoron Ni. En la letero Ĝaŭ diris: “Mi profunde kredas, ke, kiel reprezentanto de la ĉina civilizacio kaj la ĉina jurista rondo, vi, kun la aliaj juĝistoj de la Internacia Kortumo, faros elstarajn kontribuojn al la internacia justeco, paca solvado de internaciaj malakordoj kaj defendado de la internacia leĝordo laŭ la ĉarto de UNO kaj la principoj de la internacia juro.”

Ĉe la adiaŭo, mi deziris al li, ke li servu al la tutmonda popolo per siaj riĉa sperto kaj perfektaj scioj pri jurisprudenco.

## Kiel vivas kripluloj en Ĉinio

**E**N la Okfea Halo de la Bajjun-  
a Templo en Pekino ok vivo-  
veraj statuoj de feoj altiras aten-  
ton de multaj turistoj. El la sta-  
tuoj tiu de lamulo Li Tjegŭaj kun  
larĝe malfermitaj okuloj kaj gran-  
da buŝo estas multe laŭdata.

Ĝi estis skulptita de kripla ju-  
nulo Li Junlong. Li estas lerta en  
belarto, tial en 1982 oni posteni-  
gis lin en la belarta sekcio de la  
Pekina Budhisma Asocio.

En Ĉinio troviĝas 20 milionoj  
da tiaj kripluloj. Subvencianta la  
kriplulojn kaj frenezulojn, kiuj  
tute perdis laborkapablon, la ĉina  
registaro kuraĝigas la kriplulojn,  
kiuj ne tute perdis laborkapablon,  
partopreni en laboro, por ke ili  
vivu de sia laboro.

Generale, en la urboj la laboraj  
burooj respondecas pri postenigo  
de kripluloj en ŝtataj industriaj  
kaj komercaj entreprenoj, kvarta-  
laj komitatoj al fabrikoj de kolek-  
tiva posedsistemo kaj civilaj ad-  
ministracioj al bonstatigaj fabri-  
koj. En ĉiuj tiuj fabrikoj kriplu-  
loj konsistigas 35% de la laboris-  
toj kaj oficistoj. Tiaj fabrikoj ne  
pagas imposton al la ŝtato laŭ  
leĝo. En la kamparo, krom la  
subdistrikta kaj urbataj registra-  
roj, ankaŭ la ŝtato donas subven-  
cion al la kripluloj.

Al Ĉinio neniam mankas labor-  
fortoj, la ŝtato ne bezonas profiti

de laboro de kripluloj. Ĝi kuraĝi-  
gas kriplulojn partopreni en la-  
boro, por ke ili ĝuu la agrablecon  
en la vivo kaj estu respektataj de  
la socio. Tiu principo enkorpigas  
en la laboro de la industriaj kaj  
komercaj entreprenoj, en kiuj la-  
boras kripluloj.

La Kaŭĉukaĵa kaj Metalaja  
Fabriko de Pekino estas mezgran-  
da fabriko kun ĉ. mil laboristoj,  
el kiuj estas 389 blinduloj, surdu-  
loj, mutuloj kaj kripluloj. Ili  
konsistigas 40.8% de la oficistoj  
kaj laboristoj de la fabriko. Kiam  
oni aranĝas laboron, oni devas  
konsideri pri la proporcio inter  
la sanaj kaj kriplaj laboristoj. Ĉiu-  
matene, en la laborejo de botelaj  
ladkovriloj, la 47-jara grupestro  
Ĉen Juĉun, kiu blindiĝis pro mor-  
bilo en sia infanaĝo, kaj produk-  
ta administrantino Ŝja Gujjing,  
kompetenta mezaĝulino, interkon-  
siliĝas pri produkta aranĝo.  
Dank' al ilia harmonia kunlaboro  
la produktado de la grupo iras  
bonorde.

Ĉen Juĉun estas unu el la unuaj  
laboristoj de la fabriko. Ankaŭ  
lia edzino laboras tie. Ili havas  
unu filon kaj unu filinon. La 19-  
jara filo jam laboras. Ili loĝas en  
etaĝdomo post la fabriko. Lia  
hejmo estas provizita per televi-  
dilo, magnetofono, lavmaŝino k.s.  
Li diris: "De la infanaĝo mi vivis  
kune kun mia duonpatrino, pro

mia blindeco mi povis fari nenion  
kaj vivis mizere. Ĝuste kiam mi  
estis en afliktiĝo, la civila admi-  
nistracio aranĝis por mi laboron  
en la fabriko. Ekde tiam, mi ne  
nur povis vivteni la familion, sed  
ankaŭ vivis feliĉe."

Zeng Ŭenŝeng, oficisto de la  
fabrika oficejo, diris al mi: "En  
distribuado de loĝdomoj la kri-  
pluloj ĝuas favoron. En 1980 nia  
fabriko konstruis du etaĝdomojn.  
56 familioj de kripluloj kaj 31  
familioj de sanaj laboristoj enlo-  
ĝiĝis en la novaj domoj. Laŭ nia  
opinio, estas pli bone, ke la fa-  
milioj de sanuloj zorgu tiujn de  
kripluloj en ĉiutaga vivo, kiel  
ekz., akompani iliajn infanojn al  
infanĝardenoj k. s."

En tia fabriko subteni blindu-  
lojn, forviŝi ellasitan oleon sur la  
planko kaj formovi objektojn ba-  
rantajn la vojon estas devo de  
sanaj laboristoj. Ĝuste trakti kri-  
plajn laboristojn kaj koni signifon  
pri partoprenigo de kripluloj al  
laboro kaj iliajn specialajn bez-  
onojn estas grava tasko de la fa-  
briko en edukado de la ĵus varbi-  
taj laboristoj.

Ding Juĝje, oficistino de la la-  
borista sindikato de la fabriko,  
laboras kun kriplaj laboristoj  
dum pli ol 20 jaroj kaj nun fariĝis  
ilia konsilanto. Ŝi tajloras kaj  
flikas vestojn por blindulinoj, do-  
nas al ili konsilon pri fasono kaj



instruas ilin kiel flegi malsanajn infanojn. Ŝi eĉ servas kiel svatis-to. Dank' al la helpo de pliaĝa fratino Ding, lama junulo Ĝang Juŝin edziĝis al surda-muta knabino Ŝaŭ Jaĝjun. Ding Juĝje fervore geedzigis plurajn parojn da junaj kripluloj.

“Kriplul(in)o konsideras en serĉado de amat(in)o ne pri lia (ŝia) beleco aŭ ekonomia kondiĉo, sed pri reciproka konfido kaj amsento,” diris Ding Juĝje. En tiu fabriko estas enviinda familio. La edzo Hŭang An blindiĝis pro akcidento en sia 25-jara aĝo, kiam li studis en la tria klaso de universitato. Li persiste studis ĝis la diplomitiĝo. Li havis kondiĉojn edziĝi al knabino pli bona, sed li tamen edziĝis al blindulino Ŭang Se. Oni demandis lin, pro kio li faris tiun elekton. Li diris: “Ĉar ni havas saman sorton kaj komunan lingvon, ni konfidas unu al alia.” Ili havas du amindaĵn filinojn. La pliaĝa studas en universitato, kaj la juna en la tria klaso de elementa mezlernejo. Ili lernas bone, lertas en kantado kaj dancado, respektas siajn gepatrojn kaj estas helpemaj.

Ĉinio havas 1 600 tiajn bonstatigajn fabrikojn, kiel la Kaŭĉukaĵa kaj Metalaĵa Fabriko. Ankaŭ en iuj hospitaloj, sanitarejoj kaj artaj organizoj laboras kripluloj. Pli ol 70% de la 20 milionoj da kripluloj en la tuta lando havas siajn profesiojn. Ili estas respektataj pro sia kontribuo.

En Kantono 81.4% de la 5 453 laborkapablaj kripluloj havas fiksan laboron. Multaj el ili fariĝis labormodeloj, avangardaj laboristoj, fabrikaj vicestroj, kuracistoj, esploristoj, instruistoj, pentristoj kaj teknikistoj. Iu surda-mutulo kun malcedemo kaj persisteco ellernis kvar fremdajn lingvojn kaj ĉinigi fremdlingvajn materialojn por sciencaj esploroj de ler-



*Blindulo Ĉen Juĉun kaj Ŝja Guĵing*




*Hŭang An (la dekstra) kaj liaj edzino kaj filino*

nejoj kaj koncernaj unuoj. En la Internacia Ekspozicio pri Pentraĵoj de Mutuloj de Hispanio kaj la Ekspozicio pri Pentraĵoj de Ĉinaj Mutuloj de Jugoslavio okazintaj en la lastaj jaroj estis ekspoziciitaj ok pentraĵoj de surdmutulo-pentristoj en Kantono.

Moro pri zorgo kaj respekto al kripluloj iom post iom formiĝas en la ĉina socio. Nemalmultaj unuoj kaj societoj varme direktas

kaj helpas ilin organizi amuzajn kaj sportajn aktivadojn por riĉigi ilian postlaboran vivon. En la lastaj jaroj diversaj lokoj de Ĉinio plurfoje okazigis artan prezentadon ludatan de blinduloj, surduloj, mutuloj kaj aliaj kripluloj. Ili prezentis preskaŭ cent programe-rojn de muziko, danco, magio kaj pantomimo.

La registaro plurfoje faris ĝeneralan ekzamenadon, preventadon



*Surdmutulino en laborado*

kaj kuracadon al blindeco kaj surda-muteco, por ke la kuraceblaj kripluloj frue resaniĝu. La okulkonservejo de la Unua Hospitalo sub la Kantona Medicina Instituto liveris okulglobojn al pli ol kvardek blinduloj. Post kornea grefto 33 el ili reakiris vidpovon.


Ankaŭ lernaĝaj kriplaj infanoj povas ricevi la saman edukadon

kiel sanaj infanoj. La registaro fondis specialajn lernejojn por blinduloj kaj surda-mutuloj. En tiuj lernejoj blindaj infanoj lernas brajlon kaj surda-mutaj infanoj fingran lingvon. Han Zŭoli, estro de la Pekina Eduka Buroo, diris: "Ni faras ĉion eblan por ke la kriplaj infanoj ricevu edukadon kaj kresku en klereco, moralo kaj fiziko. La kriplaj lernantoj montras grandajn kuraĝon kaj memfi-

don, kio donas bonan ekzemplon al la sanaj infanoj.

40 lernantoj de la Ĝoŭkoŭdĵanja Mezlernejo en la sudokcidenta antaŭurbo de Pekino, veturigis al la lernejo laŭvice per puŝĉaro en la pasintaj kvin jaroj sian kunlernanton Li Liĉjun, kies gamboj estas paralizitaj. Nun Li Liĉjun jam diplomitiĝis kaj mem lernas fremdan lingvon por okupiĝi pri tradukado en la estonteco.

## LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Ŝanhajo
3. Hangĝoŭ
4. Suĝoŭ
5. Ĉangĝoŭ
6. Uŝji
7. Nantong
8. Ŝandong-provinco
9. Ĉinhŭangdaŭ
10. Ĝengĝoŭ

## KURANTAJ AFEROJ

### OFICIALA SUBSKRIBO DE LA KOMUNA DEKLARACIO DE ĈINIO KAJ BRITIO PRI LA PROBLEMO DE HONGKONG

La 19-an de decembro 1984, ĉina ĉefministro Ĝaŭ Zijang kaj brita ĉefministrino s-ino Margaret Thatcher oficiale subskribis en Pekino la Komunan Deklaracion

de la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Registaro de la Unuiĝinta Reĝlando de Granda Britio kaj Norda Irlando pri la Problemo de Hongkong. La deklaro perfekte solvis la problemon pri restarigo de suvereneco de Ĉinio super Hongkong kaj ankaŭ metis solidan bazon por la longa prospereco kaj stabileco de Hongkong.

Deng Ŝjaŭping, estro de la Konsilio de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj Li Ŝjannjan, prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, ĉeestis la ceremonion. Ĝin ĉeestis ankaŭ la ministroj pri eksteraj aferoj de ambaŭ landoj kaj pli ol cent diversrondaj personoj de Hongkong.

*Ceremonio por oficiala subskribo de la Deklaracio de Ĉinio kaj Britio pri la Problemo de Hongkong*



### “KONSTRUI SOCIALISMON KUN ĈINAJ TRAJTOJ” APERIGITA

Antaŭ nelonge la libro “Konstrui Socialismon kun Ĉinaj Trajtoj” verkita de ĉina gvidanto Deng Ŝjaŭping, estis eldonita de la Popola Eldonejo de Ĉinio.


La libro kun pli ol 30 000 ĉinaj ideografiaĵoj enhavas 22 gravajn parolojn de la aŭtoro. Li emfazas en la libro, ke la plej fundamenta tasko en la socialisma periodo estas disvolvi produktajn fortojn; surbaze de disvolvo de produktado oni devas paŝon post paŝo plibonigi la materian kaj kulturen vivon de la popolo. Li akcentas, ke tiel en la ĉina revolucio kiel en la ĉina konstruado estas necese kombini Marksismo-Leninismon kun la ĉina praktiko kaj iri sian propran vojon, kaj la ĉina socia-

lismo devas havi ĉinajn trajtojn kaj akordiĝi al la ĉina praktiko. Li montras, ke la kriterio por juĝi ĉiujn niajn laborojn estas nur tio, ĉu ili utilas al la konstruado de socialismo kun ĉinaj trajtoj, al la prospereco de la lando kaj al riĉeco kaj feliĉo de la popolo.

*Pli ol 30 000 tunoj da ekipaĵoj estis instalitaj en Gujŝji-aŝinaciejo en la kupra bazo en Ĝjangŝji-provinco. La instalado estis finita du jarojn antaŭ la diŝinita dato.*

### GRANDAJ SUKCESOJ DE LA ĈINA INDUSTRIO KAJ AGRIKULTURO EN 1984

En 1984 la totala produktov valoro de la ĉina industrio kaj agrikulturo unuafoje superis 1 000 miliardojn da jŭanoj (2.8 jŭanoj



egalas 1 usonan dolaron). La socia totala produktovaloro, totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo, nacia enspezo, produktokvanto de grenoj, kotonoj kaj oleo kaj tiu de pli ol 40 specoj de ĉefaj industriaĵoj antaŭdate atingis la normojn difinitajn de la ŝtato por 1985.

### **ĈINAJ MODERNAJ AŬTOVOJOJ EN STREĈA KONSTRUADO**

Konforme al la disvolvo de la nacia ekonomio kaj turisma afero Ĉinio planas konstrui 11 modernajn aŭtovojojn en la venontaj 5-6 jaroj. En 1990 la longeco de tiaj vojoj kaj unuaklasaj aŭtovojoj kun larĝeco de 24 metroj atingos 2 000 kilometrojn.

Tiuj vojoj konstruiĝos en Ŝanhajo, Nankino, Ŝenjang, Daljan, Hangĝoŭ, Ningbo, Ĉingdaŭ, Ljanjungang, Tjanĝin, Pekino, Kantono kaj Ĝuhaj.


### **LA UNUA SURAKVA SUNOBSERVA STACIO DE ĈINIO**

La unua surakva sunobserva stacio de Ĉinio — Hŭajjoŭ-a Sunobserva Stacio de la Pekina Observatorio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj finkonstruiĝis en la fino de la pasinta jaro en la antaŭurbo de Pekino. Tie la internacie avangarda magneta teleskopo fabrikita de Ĉinio mem jam instaliĝis kaj ekfunkciis. La teleskopo estas grava instrumento por esplori la magnetan kampon de la suno.

### **25 MILIONOJ DA GEJUNULOJ MEMLERNAS EN ĈINIO**

Kun la disvolviĝo de politiko, ekonomio kaj aliaj aferoj de Ĉinio, pli kaj pli multiĝas memlernantaj gejunuloj en la ĉinaj urboj kaj kamparo. En Pekino, Ŝanhajo, Ĉongĉing, Nankino kaj Uhan la memlernantaj gejunuloj konsistigas pli ol 40% de la eksterlernaj gejunuloj. Multaj el ili akiris

*La Hŭajjoŭ-a Sunobserva Stacio de la Pekina Observatorio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj*



ĝojindajn sukcesojn en siaj laborpostenoj, kaj naskiĝis el ili vicprofesoroj, inĝenieroj, teknikistoj, agronomoj, direktoroj, fabrikestroj kaj ŝipestroj.

La sistemo pri ekzamenado de memlernantoj de supera edukado akcelis la aktivecojn de la memlernantaj studentoj. Nun 24 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio faris tian ekzamenon. En 1984 la ekzamenitoj superis 700 000.

### **ĈINAJ ELDONAĴOJ DISTRIBUATAJ EN 182 LANDOJ KAJ REGIONOJ**

Ĉinaj eldonaĵoj kun pli ol 15 000 specoj havas siajn legantojn en 182 landoj kaj regionoj de la mondo. Ĝis nun Ĉinio aranĝis libroekspozicion aŭ partoprenis en internacia aŭ regiona libroekspozicio en 50 landoj. La montritaj eldonaĵoj trovis bonan akcepton de diverslokaj legantoj kaj iuj el ili estis premiitaj de

*Unu el la memlernaj grupoj de junuloj de Ŝanhajo*



gastigantaj landoj. La ĉinaj infanaj legaĵoj estis aparte bonvenaj. Multaj opiniis, ke la legaĵoj kun ĉina stilo kaj sana enhavo kuraĝigas moralan edukon kaj interesas legantojn per riĉaj scioj.

## LERNEJO FUNKCIIGATA DE KAMPARANOJ

En la lastaj jaroj multe riĉiĝis kamparanoj de la vilaĝo Ŝjisŭohŭang de Pingding-gubernio,

Ŝanŝji-provinco. Ili dediĉis 400 000 jŭanojn kaj per tio konstruis lernejon, kiu havas sportejon, naĝbasenon kaj sketejon kun areo de 5 000 kvadrataj metroj.

*Nove konstruita lernejo en Ŝjisŭohŭang-vilaĝo*



## ĈINA VERKISTO GAJNIS POLLANDAN MEDALON

Mej Ĵukaj, kiu tradukis verkojn de pollanda verkisto Henryk Sienkiewicz (1846-1916), estis honorita per medalo de la Pollanda Kultura Ministerio en la pasinta novembro, pro sia kontribuo al la interkompreniĝo kaj amikeco inter la popoloj de ambaŭ landoj.

55-jara Mej tradukis en la ĉinan lingvon tri verkojn de Sienkiewicz, gajninto de Nobel-premio, nome "Kun Fajro kaj Glavo", "Diluvo" kaj "Quo Vadis". La unua kaj dua tradukaĵoj estis jam eldonitaj kaj la tria baldaŭ eldoniĝos.

## SUKCESO DE ĈINA SKETISTO EN BUDAPEŬTO

Ŝju Ĝaŭŝjaŭ gajnis la ĉampionecon de la vira solludo en la Arta Sketado de la Danuba Termofonta Trofeo okazinta en Budapeŝto en la pasinta novembro. Li estas la unua ĉina ĉampiono en internaciaj sketaj ludoj.


La konkurso partoprenis 34 sportistoj el 11 landoj inkluzive de Britio, FR Germanio, Aŭstralio kaj Hungario.

## KRESKAS LA KOMERCO INTER ĈINIO KAJ SOVETUNIO

En 1984 la totala valoro de komercaĵoj interŝanĝitaj inter

Ĉinio kaj Sovetunio atingis 1.2 miliardojn da usonaj dolaroj, je 60% pli multe ol tiu de 1983. Ĉinaj silkaĵoj, broditaj ĉemizoj, refreŝiga unĝvento, unĝiloj, termosoj, turistaj ŝuoj, lanugaj vestoj, metiartaĵoj kaj tefolioj ĝuas grandan ŝaton de la sovetuniaj popolanoj. Moskvanoj alte taksas ĉinan brilkoloran kapkusenon tukon.

*Ŝju Ĝaŭŝjaŭ en arta sketado*



(Daŭrigo de p. 25)

Ĵurnalo Ĝjnan multfoje raportis pri E-movado de la provinco.

En la lastaj jaroj la provinco establis pli ol 20 kursojn, en kiuj lernis ĉefe instruistoj, inĝenie-roj, kuracistoj, sciencistoj kaj teknikistoj. Aperis multaj lokaj E-organizoj en la provinco, kiuj el-donas "Verda Stelo Brilas super Tajŝan", "Verda Ondo", "La Duoninsulo", "Nova Burĝono" kaj "Gvidisto".

Disvastigo de Esperanto en Ŝandong akcelas E-movadon de la provinco, kaj plifortigis la ami-kan interrilaton inter esperantistoj de Ŝandong kaj aliaj partoj de Ĉinio, kaj ankaŭ tiun inter ili kaj britaj, kanadaj, jugoslavaj, japanaj kaj usonaj

esperantistoj. Kiam la Japana Vizitgrupo de Ŭaka-jama vizitis la provincan ĉefurbon Ĝjnan, ĝi trans-donis al la esperantistoj de la urbo esperantan libron "Verda Majo" donacitan de esperanta grupo "Verda Monteto" de Ŭakajama. Esperantis-toj de ambaŭ urboj ofte korespondas esperante. Renkontiĝoj de esperantistoj de Ŝandong kun tiuj el Japanio, Usono k.a. profundigis interkomprenon kaj firmigis la amikecon inter esperantistoj.

Nun la esperantistoj de la provinco faras plu penadon, inspirate de la Tria Tutlanda Esperanta Laborkunsido. Ili klopodas por fari pli da kon-tribuo por la 71-a UK en Pekino kaj preparas sin por akcepti diverslandajn esperantistojn viziton-tajn la hejmolokon de Konfuceo.

Romano pri ĉina kamparo

CHUN-CHAN YEH

# MONTARA VILAĜO

El la angla tradukis William Auld

Serio Oriento-Okcidento n-ro 21  
sub aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio

Formato: 148 × 210 mm.


Prezo: £3,85 US\$ 7,80

Numero: 10-Es-1882S

Eldonita de ĈINA  
ESPERANTO-ELDONEJO

Mendu ĉe: Libroservo de UEA  
Perantoj de EPĈ

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio  
(GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio,  
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



# TIBETA POPOLO, LA MASTRO DE SIA HEJMLOKO

de SUN MINGĜEN

**E**N vintro de 1984 ĉie en Tibeto oni povis vidi, ke centoj kaj centoj da tibetanoj en festaj vestoj kantas kaj dancas, tamtamas kaj tamburas, por celebri la fondiĝon de la distrikta popola registaro (de nivelo sub gubernio). Ĝis la jarfino fundamente plenumiĝis la establo de distriktoj tra la tuta aŭtonoma regiono. Ĉiuj estroj kaj vicestroj de la pli ol 2 000 distriktoj estis elektitaj de la civitanoj. Tie diversnaciecaj popolanoj kun la tibetanoj

kiel la ĉefa konsistiga parto plenumas sian mastrecon rajton per voĉdonado.

## MASTRO DE LA SOCIO

Tibeto jam havas registritan historion de pli ol 1 300 jaroj. Tie la laboranta popolo neniam ĝuis mastrecon antaŭ la 50-aj jaroj de la 20-a jarcento. Antaŭ la Demokratia Reformado en 1959 la servutuloj kaj sklavo okupantaj pli ol 90 procentojn de la tuta loĝantaro havis nenion kaj tute ne

rajtis postuli pri ia ajn politika rajto. La posedantoj rajtis vendi kaj transdoni siajn servutulojn kiel bestojn, super kies vivo kaj tiu de iliaj familioj decidis nobeloj, feŭdestroj kaj superaj lamaoj.

Laŭ la peto de la tibetaj popolamasoj la ĉina centra registaro faris Demokratian Reformadon al Tibeto en 1959, kio elradikigis la feŭdan servutan sistemon daŭrintan pli ol mil jarojn. Milionoj da servutuloj ekhavis personan libe-



*Ngapo Ngaiyang-Gigme en grupa kunsido dum la Sesa Tutlanda Popola Kongreso*

recon kaj komencis superregi sian sorton kaj tiun de la tuta Tibeto. De tiam diversnaciecaj popolanoj kun la tibetanoj kiel la ĉefa konsistiga parto eniris en la epokon de mastreco.

La Unua Tutregiona Popola Kongreso okazigita en Tibeto en septembro 1965 elektis la popolan komitaton de la aŭtonoma regiono kaj sur la Tibeta Altebenaĵo unuafoje aperis regiona popola registaro elektita de la popolaj reprezentantoj.

En Tibeto, same kiel en la aliaj lokoj de Ĉinio, diversnivelaj popolaj kongresoj kaj iliaj konstantaj komitatoj reprezentas la volon de la popolo. Prezidantoj de diversnivelaj popolaj registaroj, inkluzive prezidanton kaj vicprezidantojn de la Tibeta Aŭtonoma Regiono kaj estrojn kaj vicestrojn de ĉiuj gubernioj estas elektitaj de diversnivelaj popolaj kongresoj kaj metiĝas sub ilia kontrolo.

La Popola Kongreso de la Tibeta Aŭtonoma Regiono estas la plej alta potencorgano de la regiono. 80.8 procentoj de la reprezentantoj de la nuna kvara kongreso estas tibetanoj kaj membroj de aliaj nacimalplimulto. La Popola Kongreso de la aŭtonoma regiono kaj ĝia konstanta komitato decidas pri gravaj aferoj de la tuta regiono en la nomo de la tuta popolo, rajtas leĝodonon, rajtas nomumi kaj eksigi, kaj kontrolas la registaron, tribunalon kaj prokuradorejon. Laŭ koncernaj leĝoj respondeculoj de la funkciaj departementoj sub la popola registaro de la regiono estas proponitaj de la prezidanto de la registaro kaj sankciitaj post ekzamenado de la konstanta komitato de la popola kongreso de la aŭtonoma regiono.

Dum sesioj de diversnivelaj popolaj kongresoj la reprezentantoj elmetas projektojn al la registaro

*Pabala Gelieh-Namĝe en balotado en la Tibeta Popola Kongreso*

Foto de CAJLONG



pri la lokaj konkretaj problemoj. Dum la Unua Sesio de la Kvara Popola Kongreso de la aŭtonoma regiono en aprilo 1983 la reprezentantoj elmetis sume 239 proponojn, kaj la diskuto de 236 el tiuj estis komisiita al la popola registaro de la aŭtonoma regiono, kaj 235 jam estis akceptitaj ĝis antaŭ la malfermo de la Dua Sesio de la Kvara Popola Kongreso okazigita en julio de 1984.

Krom decidi gravajn aferojn pere de siaj reprezentantoj, la tibeta popolo rajtas ankaŭ elmeti siajn postulojn, kritikojn kaj proponojn rekte al diversnivelaj registaroj per letero kaj vizito. Ĉiuj registaroj de ĉiuj niveloj havas fakon por akcepti popolamasojn por aŭskulti iliajn opiniojn. La popolamasoj rajtas ankaŭ esprimi siajn opiniojn per ĵurnaloj, radioj kaj aliaj rimedoj.

## SENĈESA FORTIGO DE LA NACIA AŬTONOMEKO

Frue en la tempo de la Paca Liberigo de Tibeto en 1951 la

interkonsento subskribita de la Centra Popola Registaro kaj la tibeta loka registaro kondiĉis, ke Tibeto praktikos nacian aŭtonomecon. Post sia fondiĝo en 1956, la Prepara Komitato de la Tibeta Aŭtonoma Regiono faris multajn preparojn por la oficiala starigo de la aŭtonoma regiono. La Tibeta Aŭtonoma Regiono oficiale fondiĝis en septembro 1965, kio markis, ke la tibeta aŭtonomeco eniris en novan etapon.

Laŭ la Konstitucio kaj la Leĝo pri Nacia Aŭtonomeco de la Ĉina Popola Respubliko, Tibeto, kiel aliaj naciecaj aŭtonomaj regionoj, ĝuas plenan aŭtonomecon sub la unueca gvido de la Centra Registaro. La aŭtonoma regiono rajtas ellabori aŭtonomajn rezoluciojn kaj diversajn lokajn regularojn nur en limoj difinitaj de la Konstitucio, praktiki specialajn politikojn kaj flekseblajn rimedojn laŭ la konkretaj kondiĉoj de Tibeto, ellabori orientilon kaj politikojn de ekonomia konstruado kaj projekton de ekonomia disvolvo laŭ la leĝoj difinitaj de la ŝtato kaj la





*Jen la Dua Sesio de la Kvara Tibeta Popola Kongreso*

Foto de **TUDENG**

karakterizaĵoj de la loka ekonomia disvolvo, memdecide uzi la lokajn financajn enspezojn kaj financajn subvenciojn asignitajn de la centra registaro, memdecide disvolvi kulturan kaj edukan aferon, decidi lokan edukan projekton kaj disvolvi naciajn kulturajn aferojn kun naciaj formoj kaj trajtoj, kiaj literaturo, arto, ĵurnalismo, eldonado, radiodisaŭdigo, filmo kaj televido.

La Tibeta Aŭtonoma Regiono plene ĝuis tiujn aŭtonomajn rajtojn. Ekde 1979 la popola kongreso de la aŭtonoma regiono kaj ĝia konstanta komitato ellaboris kaj aprobis sinsekve 13 lokajn statutojn. Por rapidigi ekonomian disvolvon de Tibeto, la popola registaro de la aŭtonoma regiono ellaboris kaj publikigis 14 administrajn statutojn kaj serion da specialaj politikoj, inkluzive malmultigon de limigo al financaj



*Fama tibet-medicina kuracisto Ĉjangba Ĉilje (kun okulvitroj) estas direktoro de la Tibet-medicina Hospitalo en Tibeto kaj prezidanto de la Tibeta Filio de la Ĉina Medicina Asocio.*

politikoj, reduktajn kaj malaltigon de industria kaj komerca imposto, kaj subtenadon al disvolvo de nacia metiindustrio. Tiuj statutoj kaj politikoj komplete konsideris la specialajn kondiĉojn de Tibeto kaj la volon de la popol-

amasoj. Ekzemple, la fleksebla regulo de geedziĝa leĝo kondiĉis, ke la minimuma geedziĝa aĝo en Tibeto estas respektive 20- kaj 18-jara, malpli alta je du jaroj ol la leĝa aĝo por la tuta lando. En majo 1984 la popola registaro de



*Reprezentantoj gratulas la nove elektitan vicedstron de distrikto.*

Foto de MA ĜINGĈIU

la aŭtonoma regiono deklaris, ke la ŝtato esceptas Tibeton el rekvizicia aĉeto en la agrikulturaj kaj paŝtaj areoj de la tuta regiono ĝis 1990. Tiu speciala politiko estas unika en ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la tuta lando.

Ke la nacimalplimultaj kadroj administras sianaciajn aferojn, tio karakterizas la nacian aŭtonomecon. Tiu celo jam estis atingita en Tibeto.

La Demokratia Reformado en 1959 faris la tibetajn laborulojn mastroj de la socio. Ĉar tiam la tibetaj kadroj estis malmultaj kaj ne spertaj, la hanoj devis sendi siajn kadrojn tien por helpi ilin en laboro. Post 20-jara penado granda nombro da tibetaj kaj alianciaj kadroj maturiĝis en praktiko.

Ĝis la fino de 1983 la tibetaj kaj aliaj nacimalplimultaj kadroj konsistigis pli ol 60 procentojn de la totala kadraro en la tuta regiono. Ĝis julio de 1984 tibet-naciaj kaj aliaj nacimalplimultoj konsistigis 83.8 procentojn de la

estroj kaj vicedstroj en la partia komitato, konstanta komitato de la popola kongreso, popola registaro kaj la popola politika interkonsiliĝa konferenco de la aŭtonoma regiono, 74.4 procentojn de la estroj kaj vicedstroj en subregionaj kaj urbaj gvidaj organoj, 78 procentojn de la estroj kaj vicedstroj en la guberniaj gvidaj organoj kaj 100 procentojn de diversnivelaĵoj kadroj subdistriktaĵoj.

La tibetaj kadroj havas efektivan aŭtoritatecon. La nuna prezidento de la popola registaro de la aŭtonoma regiono Dŭoĝje Cajdan estas tibetano kaj cetere, kvar el la ses vicprezidantoj estas tibetanoj kaj la aliaj du — hanoj. Dŭoĝje Cajdan 59-jara diplomito de supera lernejo havas sperton el 35-jara laboro. Li prezidas la tutan laboron, traktas ĉiujn gravajn aferojn kaj la dokumentoj de la registaro validiĝos nur post lia subskribo. La ses vicprezidantoj, kiel liaj asistantoj, administras unuflankan laboron respektive. La unua asistanto estas konstanta vicprezidanto Dŭoĝji Cajjang, 45-jara tibetano. Ambaŭ

ili formis la kernon de la nuna gvidantaro de la registaro de la aŭtonoma regiono.

## EGALRAJTA MEMBRO EN LA GRANDA FAMILIO DE ĈINIO

La tibeta nacieco estas egalrajta membro en la granda familio de Ĉinio. Troviĝas tibetaj reprezentantoj en ĉiuj tutlandaj popolaj kongresoj, la plej alta organo de la ŝtatpotenco. Estas du tibetaj vicprezidantoj Ngapo Ngaŭang-Ĝigme kaj Banĉen Erdeni en la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, unu tibeta vicprezidanto Pabala Gelieh-Namĝe en la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj aro da tibetaj gvidaj kadroj en la Centra Komitato de la Partio kaj la Ŝtata Konsilantaro. Laŭ la nekompleta statistiko la tibetaj kadroj jam superis 1 000 en la ŝtataj gvidaj organoj kaj ĝiaj subaj unuoj.

Ngapo Ngaŭang-Ĝigme kaj majstro Banĉen ofte diskutas kaj decidas la ŝtatajn aferojn kune kun aliaj gvidantoj de la ŝtato. Iliaj opinioj koncernantaj la tibetajn kaj religiajn problemojn estas aparte respektataj.

Ankaŭ la opinioj de tibetaj popolaj reprezentantoj estas alte taksataj de la ŝtato. Ĉe la Dua Sesio de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso en majo 1984 tibeta reprezentanto proponis rapidigi la instaladon de la tera satelita komunika stacio en Lhasa, por ke la tibetanoj povu vidi rektan televidan transsendon de la ĉefurba celebrado de la 35-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. La koncerna departemento de la Ŝtata Konsilantaro tuj alprenis efikajn rimedojn kaj finis la instaladon de la tera stacio antaŭ la 1-a de oktobro 1984 kaj tio kontentigis la deziron de la tibeta popolo.

*Bančen Erdeni (la tria de dekstre) inter tibetanoj*

Foto de  
**ĈENG MINGGUJ**



*Dŭoĝje Cajdan (la maldekstra) interparolas kun popola reprezentanto.*

Foto de **ĜAŜJI**





*Sekretarioj de la Tibeta Partikomitato ĵedi (la dekstra) kaj Jangling Dŭoĝji (la dua de dekstre) kaj urbestro de Lhasa Danba Ĝjanzŭo (la tria de dekstre) en kunveno*

Foto de CAJLONG

*Ĉjunpej (kun okulvitroj), tibetlingva vicprofesoro de la Tibeta Agronomia Instituto, estas membro de la Konstanta Komitato de la Tibeta Popola Kongreso.*


Foto de LIŬ ĈJANGANG





*Sengĉin Ljosangĝjanzan (la unua de dekstre), iama viva budho de Gaŝilunbu-templo, funkcias kiel vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tibeta Popola Kongreso kaj prizorgas la religiajn aferojn de Tibeto.*

Foto de ĈENG ŜJI





*Religiuloj kunvenas por diskuti pri tibeta konstruado.*

Foto de ĈENG MINGGUJ

*Tibet-naciecaj sciencistoj de la Tibeta Meteorologia Buroo*

Foto de ĈENG MINGGUJ





# Ĉarmaj Bludesegnaj Porcelanaĵoj

de PAN GAŬHONG

*Bludesegnaj porcelanaĵoj produktitaj  
de Ĝingdeĝen estas ormedale premii-  
taj.*

Foto de JAŬ KEĈIN



**E**N la 1984-jara Printempa Internacia Foiro de Lepsiko de DR Germanio, porcelana manĝilaro de Ĉinio kun blua desegno altiris atenton de rigardantoj. Sur la blanka fono de la porcelanaĵoj estis blua desegnita kvieta kaj gracia ĝardeno pejzaĝo de suda Ĉinio: kioskoj inter paŭlvonioj, sovaĝanseroj kaj fiŝaj velboatoj, vojetoj kaj pasantoj, la ebriiga beleco de lagoj kaj montoj kondukis rigardantojn en lirikan medion. La foiro decidis doni la oran medalon al tiu ĉi porcelana manĝilaro. Poste, la porcelana manĝilaro gajnis orajn medalojn en la 56-a Internacia Foiro de Poznań de Pollando kaj en la 15-a Internacia Foiro de Konsumado de Brno de Ĉeĥoslovakio. Ĝi estas la plej bona artaĵo el la ĉinaj porcelanaĵoj, kiu ricevis plej multajn kaj plej altajn premiojn.

De la dektria jarcento ĝis la nuna tempo, la ĉina porcelanaĵo kun blua desegno ĉiam estas bona veno al en- kaj eksterlandaj personoj. Tiuspecaj porcelanaĵoj sentigas freŝecon kaj noblecon. Homoj, montoj kaj akvoj, floroj kaj birdoj, bestoj aŭ drakoj kaj feniksoj, ĉiuj estis taŭge bildigitaj per bluaj linioj. Tiuspecaj porcelanaĵoj povas esti kaj ĉiutagaj bezonaĵoj kaj artaĵoj. Dum la pasintaj kelkcent jaroj, bludeseĝnaj porcelanaĵoj sin trovis ne nur en ĉinaj kaj alilandaj muzeoj, sed ankaŭ en ordinaraĵoj familioj.

La bludeseĝnaj porcelanaĵoj produktitaj en Ŝĵuande-periodo (1426 — 1435 p.K.) de Ming-dinastio estas rigardataj kiel netakseblaj trezoroj por ĉinaj kaj alilandaj kolektantoj. Ili nomis ilin "brilaj perloj de la Oriento". Estas multaj rakontoj pri amantoj de bludeseĝnaj porcelanaĵoj, kaj inter ili la plej interesa estas rakonto pri Aŭgusto la Dua de Saksio. Li estis amanto de bludeseĝnaj porcelanaĵoj kaj konstruis speciale palacon por konservi ilin. Ankaŭ la reĝino de la najbara Prusio tre ŝatis porcelanaĵon kaj kolektis multajn ĉinajn porcelanaĵojn. Aŭgusto tre enviis ŝiajn porcelanaĵojn, precipe la bludeseĝnajn. La prusa reĝo Friedrich ŝatis gvardianojn kaj tre enviis al Aŭgusto la bravajn kaj fortajn gvardianojn. Tial post trak-



Bludeseĝna bovlo en Jongle-periodo (1403-1425), Ming-dinastio Foto de HU ĈUJ

tato ili interkonsentis ŝanĝi sescent bravajn gvardianojn kontraŭ dekduo da ĉinaj bludeseĝnaj porcelanaj boteloj.


Eŭropajn belartistojn tre interesis ĉinaj bludeseĝnaj porcelanaĵoj. Multaj pentristoj prenis bludeseĝnajn porcelanajn pladojn aŭ bovlojn kun fruktoj ene kiel temon de siaj pentraĵoj. Kaj ankaŭ multaj eŭropaj kolektantoj ore garnis ĉinajn bludeseĝnajn porcelanaĵojn kaj prenis ilin kiel valorajn artaĵojn en ĉambro.

La bludeseĝnaj porcelanaĵoj estas vaste ŝatataj ne nur pro sia bela arta ĉarmo, sed ankaŭ pro tio, ke ili estis unufoje bakitaj en alta temperaturo kaj tial la glazuro estas kemie stabila, neniam dekolorigas kaj eltenas acidon kaj alkalon. Cetere la glazuro ne enhavas plumban elementon, do ili estas taŭge uzataj kiel manĝilaro, te- kaj kafotrinkilaro.

Nun estas multaj fabrikoj de bludeseĝnaj porcelanaĵoj en Ĉinio. Tamen la plej konataj inter ili estas tiuj de Ĝingdeĝen. La bludeseĝna porcelana manĝilaro el 45 pecoj gajninta 3 orajn medalojn estas produktaĵoj de la Porcelana Fabriko "Ĵenmin" de Ĝingdeĝen.

## KARIKATURO

Kapabla  
de ĜAŬ ĜENG



## ANONCO

La redakcio de "El Popola Ĉinio" bezonas Esperantajn poŝtmarkojn. Kiuj bonvolas cedi al ĝi siajn posedaĵojn, bonvolu skribi al ĝi pri dezirata rekompenco.

# Ĉinaj naciecoj

de LI ĈJANG

**L**A ĉinaj naciecoj vivas sur la bela kaj fekunda tero de 9 600 000 kvadrataj kilometroj. Ili kune laboras kaj kreis la longan historion kaj brilan kulturon de Ĉinio.

Laŭ la censo de 1982, Ĉinio havas pli ol 1.03 miliardojn da loĝantoj, el kiuj pli ol 930 milionoj da hanoj konsistigas 93.3% de la tuta loĝantaro de Ĉinio kaj estas la plej granda nacieco de la mondo.

La hanoj, kiel la ĉefa nacieco de Ĉinio, vivas en diversaj lokoj de Ĉinio, ĉefe en la basenoj de la

Flava Rivero, Jangzi-rivero kaj Perlo-rivero kaj sur la ebenaĵo Songljaŭ. Ili havas skriban lingvon kun 4 000-jara historio. Kiel la plej granda nacieco de Ĉinio, la hanoj iras antaŭ la frataj naciecoj en politiko, ekonomio kaj kulturo kaj ludas gvidan rolon en la ŝtata vivo.


La aliaj naciecoj havas kompare malgrandan loĝantaron. Pro tio oni nomas ilin nacimalplimultoj. Laŭ la statistiko de 1982, ili havas pli ol 67.23 milionojn da loĝantoj, t.e. ĉ. 6.7% de la tuta loĝantaro de Ĉinio. Nun

Ĉinio havas 55 grandajn kaj malgrandajn nacimalplimultojn. La respektiva nombro de la mongoloj, huoj, tibetanoj, ujguroj, mjaŭoj, jioj, ĝŭangoj, bujioj, koreoj, manĉuroj, dungoj, jaŭoj, bajoj, tuĝjaoj kaj hanioj estas pli ol miliono; tiu de la kazaĥoj, tajoj, lioj, lisuoj, vaoj, ŝeoj, lahuoj, ŝujoj, dungŝjangoj, naŝioj, ĥalĥazoj, tuoj, ĉjangoj estas 100 000-1 000 000; tiu de la ĝingpooj, dahuroj, golaŭoj, bulangoj, salaoj, maŭnanoj, molaŭoj, sibooj, aĉangoj, taĝikoj, nuoj, uzbekoj, juguroj, ĝingoj, evenkoj, benglungoj, pumioj, ĝinooj estas 10 000-100 000; kaj tiu de la baŭanoj, tataroj, dulungoj, olunĉunoj, heĝeoj, menbaoj, lŭobaoj, gaŭŝanoj, rusoj estas malpli ol 10 000. La ĝŭangoj estas la plej granda



*Hani-aj geknaboj*

*Jurtoj de mongoloj*







*Gejunuloj de diversaj naciecoj de Ĉinio*

nacimalplimulto kun pli ol 13 milionoj da loĝantoj, kaj la heĝeoj — la plej malgranda nur kun iom pli ol 1 400 loĝantoj.

Kvankam la nacimalplimulto konsistigas nur malgrandan parton de la loĝantaro, tamen ili loĝas sur vasta teritorio konsistiganta 50-60% de la totala areo de Ĉinio. De Taj'ŭan en oriento ĝis Ŝingĵang kaj Tibeto en okcidento, de Hajnan-insulo en sudo ĝis Ningŝja kaj la Interna Mongolio en nordo kaj en la Granda Ŝing'an-montaro kaj la baseno de Hejlong-rivero en nordoriento dissemiĝas la nacimalplimulto. En la tuta lando ili ĝenerale loĝas inter

la hanoj. En la lokoj dense loĝataj de nacimalplimulto la ŝtato starigis aŭtonomajn regionojn, subregionojn, guberniojn kaj distriktojn.

Ĉinio havas tiel multajn naciecojn, kaj ĉiu nacieco ĝenerale parolas sian propran lingvon. Troviĝas ankaŭ tiuj naciecoj, kiuj parolas unu komunan lingvon, kaj aliaj naciecoj, el kiuj ĉiu parolas plurajn lingvojn. Pro tio la 56 ĉinaj naciecoj parolas pli ol 60 lingvojn. Antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 troviĝis nur pli ol 21 nacimalplimulto havantaj sian skriban lingvon. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, laŭ pos-

tulo de iuj, la ŝtato ellaboris 14 projektojn de lingvoj el latinaj literoj por dek nacimalplimulto kaj provis ilin en iliaj loĝlokoj.

La naciecoj de Ĉinio havas siajn apartajn morojn kaj kutimojn. Ili loĝdomoj estas malegalaj, ekzemple, la nordaj hanoj havas domojn kun ĉirkaŭita korto, la mongoloj jurtojn el felto, la tibetanoj tendojn el bova felo, la tajoj etaĝdomojn el bambuoj kaj la ĉjangoj turojn el ŝtonoj. Ili vestoj kaj ornamaĵoj estas belaj kaj kolorriĉaj. La nordaj nacimalplimulto faras veŝtojn, botojn, ĉapojn, kostumojn kaj litaĵojn el diversbestaj feloj, la



*Jaŭ-aj knabinoj*



*La Torĉa Festo de sani-oj*

sudaj nacimalplimultoĵ faras vestojn el kotona kaj lina ŝtofoj, kaj la virinoj liaj, bulangaj, ĝingpoaj kaj tajaj portas tubjupojn tekstajn de ili mem. Diversaj belaj ornamaĵoj brilas sur la kapo kaj brusto de junulinoj. Ĉiu nacieco havas sian tradician feston. La Printempa Festo de la hanoj estas la plej granda en Ĉinio. La Novjara Tago laŭ la tibeta kalendaro

estas tradicia festo de la tibetanoj. La Akvoversa Festo de la tajoj estas la komenco por ilia nova jaro. Krome estas ankaŭ la Festivalo de la ĝingpooj, la Lunrigarda Festo de la koreoj, la Torĉa Festo de la jioj, la Marta Foiro de la bajoj k.a. Ĉiu nacieco havas sian originalan manieron de amo kaj edziĝo. Por esprimi sian amon, iuj gejunuloj kantas unu al alia,

aŭ en ludo junulino ĵetas al la amata junulo broditan globon faritan de ŝi mem, aŭ oni elektas sian amaton en ĉevalkonkurso aŭ luktokonkurso.

Nun en Ĉinio jam formiĝis novaj socialismaj moroj pri egaleco, solidareco kaj reciproka helpo inter la diversaj naciecoj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj. Kaj ĉi tiuj nun klopode laboras por prosperigi sian patrujon.

*Gajaj koreoj*  
de TJAN ĈENGJI



## Por nova internacia ordo de informado

**K**UN la disvolviĝo de la batalo por nova internacia ekonomia ordo, leviĝis en la lastaj jaroj ankaŭ batalo por nova internacia ordo de informado.

Tio estas neevitebla.

Post la Dua Mondmilito pli ol cent landoj aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj sendependiĝis kaj pli ol du miliardoj da popoloj liberiĝis el sub la imperiisma kaj koloniisma regado. La evoluantaj landoj, kies loĝantoj konsistigas 70% de la totala loĝantaro de la mondo, estas grava forto sur la internacia politika areno, sed al tio tute ne konformas ilia pozicio en la internacia informa sistemo.

Estas multaj malavantaĝoj en la nuna internacia ordo de informado:

1. Malekvilibra dislokiĝo de la informaj servoj. Laŭ statistiko, la televiziaj sendostacioj de Eŭropo, Norda Ameriko kaj Japanio konsistigas 71% de tiuj de la mondo, kaj la radiofrekvencoj kaj satelitaj orbitoj kaj la distribu-kvanto de ĵurnaloj kaj gazetoj de la evoluintaj landoj konsistigas respektive 90% kaj 3/4 de tiuj de la mondo. Krome, preskaŭ ĉiuj evoluintaj landoj havas sian novaĝ-agentojn, sed pli ol 1/3 de la evoluantaj landoj ne.

2. Malekvilibra cirkulado de novaĝoj. Kiel statistiko montras, la novaĝoj elsenditaj de la okcidentaj evoluintaj landoj al la evo-

luantaj multe superis tiujn elsenditajn inverse. Nun en la mondo pli ol 80% de la ĉiutagaj internaciaj novaĝoj estas dissenditaj de la Asociita Novaĝ-agentejo, Unuiĝinta Novaĝ-agentejo Internacia, Novaĝ-agentejo Reuters kaj Franca Novaĝ-agentejo. Nur 10%-30% de la novaĝoj temas pri la evoluantaj landoj. La nuntempa cirkulado de la internaciaj novaĝoj fakte estas unudirekta, de la evoluintaj al la evoluantaj.

3. Unuflankeca enhavo de la novaĝoj. Tunizia delegito en Unesko diris, ke la transnaciaj novaĝ-agentoj priskribas la evoluantaj landojn laŭeble el la plej malfavoraj anguloj, bruante pri iliaj krizoj, strikoj, manifestacioj, tumultoj ktp., eĉ por ridindigi ilin. Ankaŭ iu eksvicestro de la Unuiĝinta Novaĝ-agentejo Internacia konfesis, ke estas komuna tendenco en la okcidentaj informaj servoj, t.e. streĉi la atenton al la Tria Mondo, kiam ĉi tiu alfrontas katastrofojn, krizojn aŭ konfliktojn.

La malavantaĝoj en la internacia ordo de informado alportis malbonan rezulton al la internacia socio, precipe al la Tria Mondo. La evoluantaj landoj malriĉaj je novaĝoj devas dependi de la okcidentaj novaĝ-agentoj por informiĝi pri la ekstera mondo. Iu esploranto de Meksikio trovis, ke kiam Surinamo deklaris sian sen-

dependiĝon je la 26-a de novembro 1975, en Latinameriko nur la plej granda ĵurnalo "Ŝtato de San-Paŭlo" de Brazilo deprentis la informon de la okcidentaj novaĝ-agentoj.

La malavantaĝoj en la ordo de informado sentigis al la evoluantaj landoj bezonon radikale ŝanĝi la nunan staton de la internacia informado. La kunveno de ŝtatestroj de nealiancitaj landoj okazinta en Kolombo en 1976 konfirmis, ke starigi novan internacian ordon de informado estas nedisigebla parto de la ĝenerala batalo por akiri politikan, ekonomian kaj socian sendependecon. La 21-a Kongreso de Unesko en 1980 unuanime aprobis rezolucion kaj prezentis bazan ideon pri nova internacia ordo de informado.

La evoluantaj landoj faris multajn proponojn por efektiviĝi la ideon, nome la evoluantaj landoj devas sufiĉe taksati la gravecon disvastigi novaĝojn, ellabori disvastigan politikon konforman al ilia respektiva cirkonstancaro, ĉiam malpli dependi de la evoluintaj landoj pri novaĝoj, pliigi ligiĝon kaj kunlaboron de la informaj organoj de la evoluantaj kaj nealiancitaj landoj, urĝi la evoluintajn landojn doni ekonomiajn kaj teknikajn helpojn al la plej subevoluintaj landoj kaj helpi ilin starigi sian propran bazan informan strukturon. Samtempe la

evoluantaj landoj ankaŭ pledas por ŝanĝi la tradician ideon de la okcidentanoj pri novaĵa valoro kaj proponas doni "progresantan novaĵon", t. e. rigardi novaĵon ne nur kiel "incidenton", sed ankaŭ kiel ĝian tutan procezon. Ili devas komuniki ne nur tre freŝajn novaĵojn, sed precipe la disvolviĝon de ekonomio, scienco, tekniko kaj kulturo de la evoluantaj landoj.

De post la 70-aj jaroj la evoluantaj landoj jam faris firmajn paŝojn al la celo de nova internacia ordo de informado. Je la 25-a de januaro 1975 fondiĝis en Belgrado, Jugoslavio, la Unio de No-

vaj-agentejoj de Nealiancitaj Landoj, al kiu aliĝis pli ol 50 landoj. La Kariba Novaĵ-agentejo oficiale stariĝis la 7-an de januaro 1976 en Briĝtaŭno, la ĉefurbo de Barbadoso. La Azi-Pacifika Novaĵ-agentejo, starigita de la Organizo de Azi-Pacifikaj Novaĵ-agentejoj, eklaboris la 1-an de januaro 1982, kun 23 membrolandoj. La Tutafrika Novaĵ-agentejo eksendis informojn la 25-an de majo 1983, kun 23 aliĝintaj afrikaj landoj. La Latinamerika Fondaĵo de Specialaj Kontribuadoj, kune organizita de naŭ landoj de Latinameriko kaj la kariba regiono, establiĝis en la 10-a de oktobro 1983.

En batalo por nova internacia ordo de informado oni alfrontos grandajn malfacilojn. Estas granda diferenco inter la evoluantaj kaj evoluintaj landoj en la fundamenta problemo pri nova ordo de informado, kaj tia diskuto certe daŭros longe. Krome, ĝustigi la nunan ordon de informado influas la interesojn de la evoluintaj landoj, kio certe kaŭzos malhelpon kaj oponon de iuj el ili. Ĉio ĉi montras, ke la batalo estos longtempa kaj malfacila. Tamen oni devas vidi, ke batalo por nova internacia ordo de informado estas ĝenerala tendenco de la situacio kaj nerezistebla historia fluo.




*Farado de garnaĵo*

## Junaj Filatelistoj

Fotoj de SUN LIĜI

*Nove emisiita poŝtmarko-serio "Ibisoj"*

*Ekspozicio de poŝtmarkoj*





*Ordigo de poŝtmarkoj*



*Por pli bona aranĝo*

*Interŝanĝo de opinioj*



## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo:** 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondacas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- \* Celante la feston de la centjara datreveno de la internacia lingvo, ni kolektas ĉiujn ajn dokumentojn rilate al la laborista esperantismo, i.a. en Valonio: vivo de ununur- aŭ divers-tendencaj laboristaj esperanto-rondoj; partopreno de esperantistoj al la bataloj sociaj, kontraŭfaŝismaj, porpacaj kaj internacisolidaraj . . . Propraj komentoj kaj memoraĵoj ankaŭ estas bonvenaj. Nia adreso: E-o Komisiono de "Lecture Pour Tous" Asocio, Popol' Domo "Luc Genicot", 65, Chaussee de Waterloo, B-5000 Namur (Belgio).
- \* 65-j. emerita Albert Bonneault, 9, Route de Sorede, 66700 Argeles-sur-Mer, Francio, deziras korespondi kun ĉinaj geamikoj.
- \* 39-jara esperantistino deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. Karla Achour, R6 Bat 11 App6, Monastir (Tunizio).
- \* 18j. Zbyszek Slaczka, PL-38-430 M. Piastowe, ul. Markiewiczza 25a, Pollando, vol. lerni pri Ĉinio pere de korespondado kun onklo aŭ onklino.
- \* 15j. Gydrgy Hajnal, Str. n. Rusu Nr. 235, Loc. Voslobeni, Jud. Harghita, Cod. 4202, Rumanio, dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj.

- \* 17j. Ilemenés Fudit, Str. N. Rusu Nr. 233/a, Loc. Voslobeni, Harghita 4202, Rumanio, dez. kor. tutm. pri ĉiuj temoj.
- \* 16j. Dali Levente, Uifalu nr. 329, Voslobeni, Harghita 4202, Rumanio, dez. kor. tutm. pri ĉiuj temoj.
- \* Abdolreza Eshghipour, P.O. Box 426, Iran-Karadj, volas korespondi kun ĉinaj esperantistinoj pri muziko kaj danco.
- \* Ni volonte korespondus pri ĉiuj temoj. Ni atendas viajn leterojn kaj respondos al ĉiuj bele afrankitaj leteroj kaj bk. Zbigniew Leszko, str. Pawia 17/5, PL-59-300 Lubin-I, Pollando.
- \* Mezaĝa Joe Carroll, Ballydvff, Clara Road, Tullamore, Co. Offaly, Islando, deziras korespondi kun ĉina esperantist (in)o.
- \* Hungara esperanta beletra verkisto (invalidaj kune kun edzino) komunikas por siaj geamikoj la novan adreson: Csaszar Sandor, Voros Hads. ut 92/11.18, H-8500 Szekesfehervar, Hungario.
- \* 56j. rentulo dez. kor. tutmonde kun afablaj homoj pri vivfilozofio. Adr.: Guenther Enax, Weststr. 6, D-4772 Bad Sassen-dorf, FR Germanio.

- \* 35j. Manfred Kirsch, DDR-7420 Schmolln, Brandstr. 21, GDR, deziras korespondi kun geamikoj el Ĉinio kaj Azio. Interŝanĝo de pm, bk, mapoj, donacoj. Respondos certe. Parolas ankaŭ angle.
- \* Filatela Kooperativo, Strato Castro Barros 1433, 1237 Buenos-Aires (36), Argentino, deziras interŝanĝi p.m., poŝtstampojn, kovertojn ktp.
- \* Mowrcikloadeptoj kontaktos samhobiajn esperantistojn. S.B.M. Etmanowicz, str. Zamenhofa 4c/l, 67-100 Nowa Sol, Pollando.
- \* Eldonejo & Librejo Sonorilo havas Eldonan Fondajon. En 1985 ni volas eldoni ankaŭ librojn. Jen kelkaj titoloj: "Murdo pro malespero", "Ora abelo" kaj "Malnova legendo". Ni dankas ĉiujn personojn kiuj jam donacis monon al nia Eldona Fondajo. Vi povas donaci monon al nia eldona fondajo per nia poŝtĉekkonto: Bruselo 000-0152140-44 je nomo de Eldonejo & Librejo Sonorilo, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk-Antwerpen, Belgio, kun mencio de: donaco al Eldona Fondajo.

## SCIIGO


**T**RADUKADO de la artikoloj en EPĈ por aperigo en nacilingvaj gazetoj, represo de niaj artikoloj en naciaj aŭ internaciaj E-revuoj kaj reaperigo de niaj fotoj aŭ bildoj en gazetoj estas ĉiam permesataj kaj bonvenaj.

Ni nur petas, ke oni sendu al ni (EPĈ, P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio) po 3 ekz. de la revuo aŭ gazeto, en kiu aperas la traduko aŭ represaĵo de niaj artikoloj, fotoj aŭ bildoj. Antaŭdankon.

La redakcio de El Popola Ĉinio

# FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

*Insuletaro apud  
Göteborg de Svedio*  
de **GERARD GERRITSE**  
(Nederlando)



*Betula lageto*  
de **GERARD GERRITSE**  
(Nederlando)



